



NORDHUNGARIA INFORMO

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc**

Januar' - Februaro 2009a

4. évfolyam 41 - 42. szám

La Jaro 2009-a.....	3
Paŭlo Prokrasty	4
La malgranda vilaĝo.....	6
ŜERCO	9
La bela ekzemplo	9
Leteroj de niaj legantoj.....	10
Mallonga raporto pri miaj personaj spertoj en Israelo inter la 23a kaj 30. decembro 2008....	11
Johano Kalvin kaj la Reformacio	12
LA AVAŜ - MONTA PREĜEJO.....	12
En la Internacia Memortago de la Holokaŭsto en la Juda Tombejo de Miskolc.....	17
Ni funebras	19
Sur montopint' fajrera	19
TEMUĜINO, LA FILO DE LA STEPO	20
Pasero en arbusto.....	24
Helpo alvenis.....	26
ANONCOJ	26
Konservado de historiaj tradicioj en Hungario	27

La Jaro 2009-a

Simile al la jaro 2008-a, ankaŭ la 2009-a iĝos la Jaro de multspecifaj okazintaĵoj.

Mi nun mencias kelkajn eventojn, pri aliaj ni rakontos en la sekvaj numeroj de nia revuo.

2009: estas:

- 1, Jaro de la Kultura Turizmo en Hungario,
- 2, Internacia Jaro de Haydn kaj de la Astronomio,
- 3, Ĉijare en majo ni festos, ke en nia urbo Miŝkolco antaŭ 150 jaroj komenciĝis la fervoja trafiko de MÁV (Hungara Ŝtata Fervojo -1859).
- 4, 110. jara estas - la unua,- la Papszer strata konstruaĵo de la Herman Ottó Muzeo de urbo Miŝkolco.
- 5, 60. jara estas la Centra Metalurgia Muzeo en Miŝkolco.
- 6, En la jaro 2009-a komenciĝas la jaroj prinomitaj pri Johano Kálvin, je estimo de la 500-a datreveno de sia naskiĝo (1509-1564), kaj la 450-a datreveno de sia morto: ĝis 2014.
- 7, La festado de - la antaŭ 150 jaroj naskita kreinto de lingvo Esperanto - D-ro L.L. Zamenhof, okazos en lia naskolanda urbo Bjalistoko, inter festenaj cirkonstancoj, okaze de la 94-a Universala Kongreso de Esperanto.

Kvankam lastloke mi menciis nun la UK-n okazonta en tiu grava urbo, en ĉi tiu numero ni donos mallongan informon pri ĝi.

La 2009-a estas jaro de la Kultura Turizmo en Hungario

„Celo de la Hungara Turizma A.S. estas por tiu aranĝserio; la konatigo de la kulturaj trezoroj, heredaĵo de la lando, kiel plivastigo de la fremdultrafiko, konstruiĝanta sur tiu.

En la por tiutemo anoncita granda landa konkurso; por realigi la eventojn, entute 37 milionojn da hungaraj forintoj gajnis la Miŝkolca Internacia Operfestivalo kaj la Miŝkolca Vintra Galantino Festivalo.

Al la pli vasta argumentado apartenas ne nur la vizito de la diversaj aranĝaĵoj, festivaloj kaj la artobjektoj, sed ankaŭ la gastronomio. Ĉi jare la tago de la Vintra Galantino Festivalo estos la 26-a de februaro”

(Laŭ la 10-a ĉijara numero de semajngazeto MINAP)

El inter la multspeciaj delikataj galantinomanĝaĵoj ni konigas preparmanieron de iu specialaĵo:

Ruĝa vina apro-galanteo (Recepto de mia avino)

Al la purigita kaj lavita haŭta aprofemurviando (2 kilogramoj sen ostoj) aldonu:

Unu karoton, unu petroseltrunkon, unu cepon, ses segmentojn de aleo, ses nigran pipron nerompitan.

Sur la tuton verŝu tiom da ruĝa vino, kiom tute kovras ĝin. Poste aldonu tiom da akvo, ke la tuta suko atingi tri fingrojn plie kien atingis la pli frua sukokvanto. Saligu, sed ne tro. Kovrite kuiru sur malforta fajro malrapide, ke ĝia suko ne estiĝu malklara. Kuiru ĝis la viando estos tutkuirita sed ne tro mola. Lasu la viandon senvarmiĝi en sia suko. Tiam ellevu la viandon, tranĉu ĝin al egalgrandaj pecetoj kaj metu en malsupron de teleroj, bovloj. La sukono de la galantino trafiltro kaj verŝu sur la viandon.

Vi povas tavoligi la materialon, kaj bele lokite la tavolojn sur la viandon, la tuto iĝos tre belaspekta, dezirekscita.

La tavoligado povos okazi per:

bakita anserhepato, bakitaj - aŭ kuiritaj fungotranĉaĵoj, kuiritaj kokinovoĵoj tranĉite al pecetoj, kaj kun la viando kunkuiritaj legompecoj. Ne forgesu: sur la supraĵon de la viandaĵo verŝu

ĉiam sukoni. Kovrite la pladojn metu ilin en malvarmetan lokon por rigidigi ties enhavon (por tri horoj). Oni povas laŭvole ankaŭ faligi la galantinon sur pleton, sed pli frue metu la malsupran parton de la ujo en varman akvon por kelkminutoj.

Antaŭ ties altabligo la galantinon pleton oni povas ornamati per: krudaj petroselofolioj, citronringoj, rastita kreno, eĉ per acidigitaj kukum-tranĉaĵoj.

Bonan apetiton al la speciala bongusta manĝaĵo!

Bjalistoko per sia 300 000-a loĝantaro estas mezgranda urbo de la nuna Pola Respubliko, konata la lando; kiel koro de Eŭropo.

Ĝi estas ĉefa urbo de la Podlaĥia vojevodio, grava kaj rapide evoluanta administra, ekonomia kaj kulturscienca centro de la teritorio. Pli ol 45-000 studentoj lernas inter muroj de ĝiaj Universitato kaj Altlernejoj. La kulturan vivon de la urbo helpas la galerioj, muzeoj, la drama kaj pupteatroj, kelkaj privat-teatroj kaj la Filharmonia Orkestro. Ĉi lasta estas unu de ties plej bonaj orkestroj. Ĉi tie ni devas mencii ankaŭ la nun konstruatan grandmezuran operdomon.

Bjalistoko, perfekta loko estas por la sopirantoj de la kultúra ripozo kaj por vivi. Konsiderindaj estas ne nur la ĉarma aspekto de Bjalistoko, sed ankaŭ ĝia historio.

Dum la pasintaj centjaroj ĉi regiono estis multnacieca, en kiu miksiĝis la kulturoj orienta kaj okcidenta. Ĉi kultúra riĉeco pluherediĝis al la nune tie vivantuloj. El tiuj ne estas ellasebla ekzemple: en la urbocentro estanta impona barok-stila kastelo de la familio Branickij.

Post la dua mondmilito la Bjalistokanoj rekonstruis la prekaŭ tutkomplete detruitan urbon. Ties konsekvenco estiĝis la urboaspekto nuna: la aspekton de la fantastike modernaj konstruaĵoj buntas la kontrastoj de la ligno-kabanoj. Ĉi urboaspekto ĉirkaŭbrakumita per la nature konserviĝintaj naturvaloroj, unika estas en tuta Eŭropo.

Oni nomas ĉi regionon „Verdaj Pulmoj de Pollando”. Tiu pronomo tre konvenas, ja el areo de Bjalistoko 32 % estas verda teritorio: parkoj, arbaroj, ks. Mi mencias aldone, ke 1779 hektaroj estas la arbara teritorio el ĝia areo.

Trans ĝia teritorio kondukas multaj internaciaj vojoj Orient-Okcident-direktaj, kaj tiu situacio pligrandigas ĝian ekonomian signifon. Inter ili estas ekzemple: la fervojlinio Berlino-Varsovio-Sankt-Peterburgo-Moskvo kaj la landa aŭtovojo nro 18a kondukanta al la orienta ŝtatlimo.

Inter la pliaj estontecaj evoluoj rolas la planata elkonstruo de grava internacia vojo: „Via Baltica”: el Skandinavio al la suda Eŭropo.

Bjalistoko estas proksime al Belorusio kaj Litovio, do ĝi funkcias kiel centro de la ĉelima komerco kaj instigas ankaŭ la disvolvigaĵajn planojn de la du landoj.

Adri, s-rino Pásztor

Sándor Petőfi

Paŭlo Prokrasty

Kiel princo malbenita
trans la Ocean' Fabela,
sola vivas Paŭl' Prokrasty
grumble sur bien' nobela.
Ho, se estus edzineto,
ŝanĝus sin la vivmanier' ...
Interrompis Paŭl' Prokrasty:
„Eh, ne urĝas la afer'!”

De l' kadukas dom faladas
la mortero, kaj la vento
dio scias kie kuras
kun la peco de tegmento,
Riparigu ĉar rigardos
tra l' plafono la ĉiel' ...
Interrompis Paŭl' Prokrasty:
„Eh, ne urĝas la afer!”

La ĝardeno dezertiĝis,
sed floras agrogrundo:
ĉia spec' de sovaĝfloroj
tie pompas en abundo.
Kial dormas laboristoj,
pigras la plugita fer' ?
Interrompis Paŭl' Prokrasty:
„Eh, ne urĝas la afer!”

Kaj la vestoj! L' olda jako
kaj trivita pantalono
taŭgus por araneaĵo
jam nur en necesbezono.
Sendu voki la tajloron,
drap' atendas en kamer' ...
Interrompis Paŭl' Prokrasty:
„Eh, ne urĝas la afer'!”

Tiel li tra l' viv' vegetas.
Kvankam al li de l' praavo
restis heredaĵo riĉa,
ĉiam estis li sen havo.
Sed ne estas luia kulpo:
naskis lin hungara ter',
Kie estas pradevizo:
„Eh, ne urĝas la afer'!”.
/Peŝt, novembro 1847/

/Eldonita en volumo Petőfi: Libero kaj Amo/ 1970/ Esperantigis D-ro Kolomano Kalocsay/

s-rino Adri Pásztor
La malgranda vilaĝo
-Raporto -

Ĉi-jare ni aŭdis ege malmulton pri regiono Cserehát en Nord-Hungario. Tial, kun mia edzo ni decidis viziton de tiuj vilaĝoj situantaj malproksime de urbo Miskolc. Laŭ la landkarto ni elektis vilaĝon Abaújszolnok. Ĉar ni estas pli ol 65 jaraĝaj kaj povas veturi per la veturiloj senpage kaj la meteorologio antaŭdiris belan sunbrilan veteron, ni ekvojaĝis la 22-an de oktobro en 2008.

Ĝis urbo Szikszó ni ĝuis la bone konstruitan landvojon, la aŭtobuso kuris senskuade kaj montris belan vidaĵon la aŭtuna foliaro de la duflanka aleo. Forlasante urbon Szikszó la trafikvojo ne estis jam senskuada, la asfalto estis frakasita kaj pretendis urĝan renovigon. Laŭ la vojo ni vidis sur la elektraĵoj mastoj malplenajn nestojn de cikoniooj. Ni memoris pri tiuj malfeliĉaj hirundoj, pri kiuj ni povis legi en la septembraĵoj tagĵurnaloj. La eksterordinare varma vetero ĝenis iliajn temposensojn kaj ne ekiris ĝustetempe al la sudaj regionoj. Pro la subite alvenanta malvarma vetero iliaj flugiloj rigidigis. Oni donis por ili helpon en la birdoobservejoj kaj tamen ili povis ekiri al sudo.

Dumvoje la selejoj montris belan bildon. Sur la kampoj jam okazis rikolto de la maizo, kelkloke la fojnopremaĵoj atendis la hejmenportadon. Oni jam plugis lokojn por la ĉijara greno kaj aliaj kreskaĵoj. Aliloke la novaj grenoparceloj jam verdiĝis. Laŭ la vojo estis starigitaj el ligno ĉarpentitaj atendejoj por la aŭtobuson atendantoj. Ni vidis florbedojn, sur kiuj ankoraŭ floris la pelargonio, en aliaj jam estis plantitaj trikoloretoj. Ĉe vilaĝo Selyeb, sur la du flankoj de la vojo estas blankaj pentritaj ŝtonoj, kio estas bela vidaĵo, eĉ utilas, ĉar tage-nokte montras randon de la vojo. Forlasante Selyeb, la vojo iĝis ĉiam pli kaj pli malbona, la aŭtobuso povis kuri pli malrapide.

Ĉe vojdisiĝo al la vilaĝeto Nyésta, la aŭtobuso haltis. Du personoj elbusiĝis. Ambaŭ du ekiris alidirekte. La dek jara knabineto ekiris sur iu kampovojo al sia vilaĝo, kiu situas inter la malproksimaj montetoj. Ekde la reĝimŝanĝo aŭtobuso ne trafikas al la vilaĝo de tiu knabino. Ĉi fakto signifas tion, ke dum la marŝado perpiede al la alisettleja lernejo kaj de tie reen hejmen, ŝi devas piedmarŝi sume dek kilometrojn. Tio estas ege danĝera por infanoj kaj maljunaj homoj. Sed ankaŭ tio estas pripensinda, ke dum malvarma vintro, sur glacia neĝa vojo tiu piediro estas ege malagrable ago. Kaze de pluvo ne estas kovrita atendejo de buso.

Dum ni pripensis pri ĉi tiuj, ni atingis al vilaĝo Abaújszolnok. Ĉi tiun etan vilaĝon malaltaj montetoj ĉirkaŭas, sur kiuj kreskas en grandiozaj parceloj kolzoplantaĵo. Al ĉiuj domoj grandaj terenoj apartenas, sed nur apud malmultaj domoj estas kulturitaj terenoj. La kortoj estas herb-kovritaj, malpuraĵo ne estas. De la domo ĝis la pordego nur kelkloke estas betontrotuaro, ne estas ornamfloraj, legomaj kaj fruktaj ĝardenoj, kiu situacio similas al la okcidenthungaria stato. Oni klarigis tiun situacion en Okcident-Hungario, ke la loĝantaro laboras en Aŭstrio, de tie portas hejmen ĉiujn varojn, oni ne devas produkti tiujn kaj la ornamfloraj ĝardenoj estas bonaj por allogadi la gastojn. Ĉi tie en Abaújszolnok la bela pejzaĝo povas allogadi la gastojn, sed dormejebleco (pensionoj) ne ekzistas, ne estas t.n. „ŝlosildomo”, nek turistdomo por vizitantoj de la loko. Ĉe multaj domoj ni ne vidis fumantan kamentubon, sekantajn vestaĵojn, katon, piedgratadantan kokonon, anason, anseron, meleagron, aŭ ĉevalon, bovinon, ŝafon, kapron, kiel kutimas en bonaj vilaĝoj Sed estas tereno por produkti furaĝkreskaĵojn kaj en - kaj ekster la vilaĝo...

La vilaĝeto ne havas lernejon, pasintjare la kuracisto mortis, de tiam ĝi havas nek kuraciston. La parokejo estas malplena, baldaŭ ruiniĝos, vane estas bonege konstruita konstruaĵo, se same aspektas kiel konstruaĵo de la forlasita ne uzita lernejo. En la vilaĝo estas multaj forlasitaj loĝdomoj, domejoj. La pastro venas por celebri diservon en la romkatolikan preĝejon el la vilaĝo Homrogd. Kvankam la preĝejo havas bonan staton, ĝia tegmento estas ferlada, tamen

kelkloke falas la mortero de la muroj. Tiutempe oni portis lignon por la maljuna sonorilegisto, kiu – tiel diris al ni – pro tio ne havis tempon por sonorilegi tagmeze kaj ne povis montri la preĝejon al ni, ĉar la lignon ŝi mem sola devis enportadi en la ŝedon pro la eventuala pluvo, kaj pro la koncernaj lignoforŝelistoj.

Ni dezirintus ekscii ion pri pasinto kaj nuntempo de la vilaĝeto kaj serĉis la vilaĝan konsilantaron. La konstruaĵo estis fermite, ĉar estis merkredo kaj ne lundo...., La sinjoro vilaĝestro nur lunde aranĝas akceptohoron.” - estis skribita sur la pordon de la vilaĝestra oficejo. Kial estas vilaĝkonsilantarejo, se tie neniu laboras dumsemajne? –ni demandis. La loĝantoj nur tiradis ŝultrojn: Ĉi tie nur aero estas, alia nenio. La sola eta ĉiovendejo ne estas malfermite tuttage. Iu vilaĝanino miris, ke ni venis el la malproksima urbo por ekskursi tien, „ en la vilaĝon postan de la Di-dorso!”

Dum nia tiea restado ni promenis tra la mortanta vilaĝo kaj al ties –ĉirkaŭaĵo. Ni admiris la nun amase florantajn flavajn malgrand- kaj grandpetalajn sovaĝflorojn, la trifoliojn, la pomarbojn apud la landvojo, ruĝantajn berojn de la sovaĝgrozo kaj krategoj, maturajn sed jam ne acidajn berojn de la prunelo. Ni vidis lemnon sub la paŝponto sur la akvonivelo de rivereto Vadász (Ĉasisto). Ni vidis en ĝardeno de la preĝejo la maljunajn prunarbojn kaj la ankoraŭ sur arbo restantajn cidoniojn. En la ne kulturitaj ĝardenoj la malfrue maturiĝantaj nigraj vinberoj ankoraŭ ne estis kolektitaj kaj sekiĝinte survinbertrunke atendis ke iu portu ilin en la kameron. Flaviĝanta foliaro de la robinio kaj la bele zorgitan tombejon ĉirkaŭantaj arĝentoploj estis belaspektaj. Ĉirkaŭ la aŭtobushaltejo bele faritaj, de blankaj ŝtonoj ĉirkaŭmetitaj florbedoj atestis laboron de zorgemaj manoj, kiuj volis beligi ĉi tiun etvilaĝon. Iu maljunulino diris al ni, ke ŝi edziniĝis en 1950 kun ĉi tiea vilaĝano, kaj tiutempe la domvico ne estis manka –kiel nun. Ŝi kaj sia edzo laboris en la Agrokooperativo kaj sur la ricevita ĉirkaŭdoma bieno ili produktis ĉion necesan. Tiam nenio mankis. Post la reĝimŝanĝo ĉesis funkcii la Galvanoteknika Uzino, la Agrokooperativo kaj la Porkograsigejo. Je nuntempo, el ili restis, nur la granda nenio. Kiu povis, tiu forfuĝis el la setlejo kaj alie provis serĉi laboron por vivi. Nur 18 hungaraj familioj vivas en la vilaĝo. Ĉe ili estas brutoj: ŝafo, du bovinoj kaj kelkaj familioj bredas ankaŭ porkojn.

Kiuj ne foriris, tiuj estas maljunaj, sed ili okupiĝas pri dombestoj. Ili diris, ke ankaŭ post la dua mondmilito delonge grava estis la bestbredado en la setlejo. La nun laborkapablaj personoj laboras en urbo Szikszó, aŭ en aliaj vilaĝoj. Ili havas propran aŭton. Kiam ni interesiĝis pri la laboranta loĝantaro, malgaje ili diris, ke 70 % de la loĝantaro estas cigandevena, tamen ne tio estas la problemo. Sed tio estas la damaĝo, ke ili volas vivi nur el la ricevita helpmono kaj ne serĉas la laboreblecon, ne volas labori alie, ne volas parton preni el la porpublikaj laboroj de la vilaĝo. Ili diras, ke la helpmono estas pli alta ol la monata salajro ie ajn. Do, kial ili laboru por tiom da malaltsumo de mono, kiu ne indas, ke ricevu ĝin pro ilia peza laboro. Eĉ ili primiras tiujn kelkajn ciganajn familiojn, kiuj entreprenas la sisteman laboron kaj parton prenas el la porpublikaj laboroj.

Dum ni atendis la aŭtobuson, ni renkontiĝis kun prezidantino de la Cigana Konsilantaro, kiu estas ĉarma, belega junedzino. Ŝi diris, ke en la tombejo la herbon falĉis ŝia edzo kaj aliaj tri ciganaj viroj. Ni konstatis, ke la tombejo estas tre bele zorgita. Vere, multaj miskolcaj tombejoj ne estas tiel zorgitaj kiel tombejo de Abaujszolnok. La prezidantino ĝoje aŭdis de mi, ke al mi tre plaĉas la belaj florbedoj. Ŝi diris, ke tiujn florbedojn ŝi faris, ĉar aŭdis, ke ankaŭ en aliaj lokoj oni faras florbedojn. Ŝi volis, ke ankaŭ en Abaujszolnok estu tiaj. Ŝi diris eĉ tion, ke ŝi kaj el kelkaj kleraj ciganfamilioj partoprenas laboron de Fondaĵo, kiu helpas vilaĝon Abaujszolnok. Ili lernas en gimnazio de Selyeb /kiu estas fakultato de gimnazio de Sajókaza/, kie oni lernas krom la multaj utilaj lernobjektoj ankaŭ florproduktadajn konojn. Ili dezirus produkti kuracplantojn en limo de la vilaĝo. Ĉirkaŭ ilia etvilaĝo estas montetoj, kiuj estas sunbrilaj teritorioj kaj estas taŭgaj por produkti kuracplantojn. Mi proponis al ili kolektadon de beroj de sovaĝgrozo, ĉar tiel ŝajnas, ke la miŝkolcaj apotekoj aĉetas tiujn berojn.

Nature oni devas organizi la laboron kaj devas interesiĝi ĉe la apotekoj. La familioj povus okupiĝi pri korboplektado, ja apud la rivereto Vadász salikarboj kreskas, ties vergoj estas taŭgaj por plekti korbon. Aŭ oni povas semi sorgon, el kiuj ili povus fari balailojn. Ankaŭ tiuj estas laboreblecoj. Oni povus kulturi arbojn el semoj, farante arboplantejojn. Neutiligita teritorio estas abunde.

„Mi tiel pensas, ke multe da malfacilaj laboroj atendas nin” – diris la junedzino – „sed la plej malfacila tasko estas konvinko de la malinklinanta plureco de la setlejanoj. Sed ni entreprenis ĉi tiun taskon, ĉar ni devas fari tiujn taskojn por nia popolo, por la vilaĝo, ja ni volas vivi.”

Dum la adiaŭo mi kaj mia edzo deziris animforton, persiston al ilia laboro.

La alia vilaĝanino – s-rino Ferenc Bai. – loĝanta en Abaujszolnok, str. Rákóczi n-ro 37.- kun kiu ni veturis aŭtobuse tien kaj reen, adiaŭante transdonis al mi historion de la vilaĝeto.

Jen, historio de Abaujszolnok, kiu etvilaĝo nun malbonstatas, sed volas vivi.

„Vilaĝo Abaujszolnok, nome Szolnok situas en departemento Borsod-Abauj-Zemplén, en meza parto de regiono Cserehát (Ĉerehat), en valo de rivereto Vadász. Tiu estas alproksimebla de urbo Miskolc tra urbo Szikszó. Ĝia distanco estas 23 km al Szikszó, norde.


Ĝi estas montetregiona vilaĝo, kie la domoj konstruiĝis en du linioj en valo de rivereto Vadász. Ĝi havis 398 loĝantojn en 1910, 143 loĝantojn en 1990. Nntempe la nombro de la loĝantoj malpliiĝis.

Oni menciis unue ĝin en 1256, tiutempe ĝia nomo estis „Zonuk”. Ĝi estis submetiĝinta teritorio en la turkaj tempoj. Post jaro 1640 iĝis prerio. Komence de la 18. jarcento la familio Rákóczi koloniigis ĉi tien Rusenojn, sed la loĝantaro jam hungariĝis ĝis fino de la 19-a jarcento. Ĝi ricevis la nunan nomon en jaro 1905. Laŭ la 1881. jara leĝo estigita administracia instanco apartenante ankaŭ slovakdevena loĝantaro koloniigis ĉi tien. La loĝantaro faris puntobaton ĝis 1919. Ĝi havis ankaŭ reformatan preĝejon inter 1938 kaj 1944, kiun plurfoje oni trakonstruis, lastfoje laŭ frua-gotika stilo. Nuntempe reformata preĝejo ne estas, anstataŭ ĝi estas romkatolika preĝejo.”

El inter la laborantaj sed malriĉaj setlejanoj, de la ŝtato naŭ familioj ricevis ret-uzeblecon per komputiloj. Unu el la Ciganaj Vilaĝestraranoj ĉiutage akompanas la infanojn tien-reen en kaj el la lernejo irantajn venantajn infanojn, ke ili sur la aŭtovojo kaj dum siaj vojaĝoj ne vojaĝu solaj. La sama Fondaĵo helpas la siasetleajn infanojn por viziti la Miŝkolcan zooĝardenon kaj partopreni alisetleajn komunajn festojn aranĝatajn por la publiko.

Mi instigis niajn kunbabilantojn, ili persiste agadu en la malfacilaj taskoj: Volu ili fari la konvinkon, ĉar vivi ankaŭ en la estonto, ne perdiĝi, povis ĉiam ĉiu popolo nur per solidareco, serioza kunlaboro kaj senegoisma ofer-surpreni.

(Hungarlingvan artikolon de s-rino Adri Pásztor, esperantigis László Pásztor la 19-an de novembro 2008a)





ŜERCO

Leganta virino

Post unuhora fiŝkaptado la edzo decidas albordigi la boaton kaj iom ripozi. La edzino tamen havas emon eliri lagomezen kaj legi tie. Ŝi do startigas la motoron, enveturas mezen kaj elĵetas la ankron. Nelonge poste aperas fiŝkaptista inspektisto.

- Sinjorino! En ĉi tiu parto de la lago estas malpermesite fiŝkapti!
- Sed sinjoro, mi ja ne fiŝkaptas, mi nur legas!
- Jes, sed vi havas ĉiujn ilojn por fiŝkapti, kaj iam ajn vi povos komenci tion!
- Sed mi ja diras, ke mi legas!
- Se vi ne iros aliloken, mi devos punnoti vin!
- Ĉu pro legado?
- Ne, sed ĉar vi fiŝkaptas en nepermesita loko! Nun eble vi legas, sed vi havas ĉiujn ilojn por fiŝkapti, kaj iam ajn vi povos komenci tion!
- Nu bone, sed tiam mi denuncos vin pro seksa ĝenado!
- Sed mi ja eĉ ne tuŝis vin! Nenion mi faris!
- Sed vi havas ĉiujn ilojn por tio, kaj iam ajn vi povos komenci tion!
- Belan tagon pluan, sinjorino! – li diris kaj foriris.

Instruo: neniam diskutu kun virino, kiu legas, ĉar tia verŝajne kapablas ankaŭ pensi!

Ŝercon de Imre Cséti, /Debrecen/ esperantigis Jozefo Horvath, Győr

La bela ekzemplo

Gvidantoj de la „Kővirág” /ŝtonfloro/ Popolkanto-rondo de Tállya, invitolon sendis al la geedzoj Pásztor por partopreni ilian karnavalan amuziĝon. La 7-an de februaro 2009a de la 19-a horo komenciĝis la aranĝaĵo en la gimnastikejo de la vilaĝo, kiu loko havas la geometrian mezpunkton de Eŭropo. Sinjorino Ferenc Kalina kaj sia filo Ferenc organizis la zorgopelantan semajnfinan amuziĝon de Tállya. Ilia ĉi aranĝaĵo ekde 13 jaroj gajnas la plaĉon de siaj gastoj. La jam menciitaj du gvidantoj de la Popolkantorondo, kaj la tuta membraro kune kun siaj familianoj prezentis la gajigan programon. Ili mem faris ankaŭ la antaŭpreparon

– per tabloj, seĝoj, scenejo, muzikinstrumentoj - de la okazejo, kaj post la okazaĵo ankaŭ la forigojn de la aĵoj kaj la purigon de la ejo. La deklamoj, kantoj, kaj ceteraj gajaj scenoj rapidritme sekvis unu la alian. La sukceson garantiis la plenumita bonega komuna kunlaboro, kion laŭdis la bonhumuro de la karnavalantoj. La publiko starante aplaŭdis la programerojn! La fajnajn delikataĵojn kuiris, bakis Plaszkó, László (Ladislao Plasko) kuiristo el Abaujszántó. La teatrajn vestaĵojn prepari helpis la Kulturdomo de Abaujszántó. La refreŝigajn senalkoholajn drinkaĵojn kaj ankaŭ la alkoholaĵojn donacis la lokaj produktantoj. La muzikon por danci, servis unu samloka ĵazpianisto. Li ludis kaj hungarajn muzikojn kaj aliajn bone konatajn, vaste ŝatantajn melodiojn. La amuziĝo daŭris ĝis la alitaga tria horo. Aranĝaĵon de la Popolkanto-rondo, honorigis per sia partopreno ankaŭ la vilaĝestro kaj la notariino de la setlejo. La 80 gastoj alvenis el: Tállya, Abaujszántó, Szerencs, Tizsakécske kaj Miskolc.

Ni gratulas al ĉiuj antaŭhelpantoj de sukceso de la vere tre bonhumura amuziga aranĝaĵo! Al ripeto de ĉi bela ekzemplo de la bonega homa kunteno, kunlaboro, ni deziras multe da bona sano kaj vivforto! Ni fartis tre agrable!

En nia ambaŭa nomo dankas la la ricevitajn ŝancon por partopreni:

Adri, s-rino Pásztor

Leteroj de niaj legantoj

„BONA ESPERO – BRAZILIO

Karaj gesamideanoj,

Via surpriza kristnaskosaluto vere ĝojigis nin kaj sincere ni dankas por viaj simpatiaj vortoj!

Ni aŭskultis la kantojn de la belega arbo, sed ili estas ne en hungara sed en angla lingvo.... Bedaŭrinde ni ne havas retkontakton en la bieno. Ni devas vojaĝi 20 km al la urbeto, eniri tie rapide la interreton kaj porti hejmen la mesaĝojn, respondi ĉi tie kaj denove veturi por forsendi la respondojn. Do ĉiam vi devas atendi kelkajn tagojn.

Ni ne povis eniri vian retgazeton, sed nur legis hejme pri ĝi. Volonte estonte ni povas sendi al vi informojn. Aldone kelkajn fotojn de nia Kristnaska festo, kiun partoprenis 92 personoj, kiam la infanoj prezentis la kripon de Jesuo kaj kantis kristnaskajn kantojn kun akompano de violinistino.

La Kristnasko-Patro donacis al ĉiuj donacon kaj iliaj vizaĝoj spegulas la feliĉon.

Dankon por legi la libron de Roman pri nia tropika aventuro en esperanto!

Estas vere persona realiĝo povi helpi al tiom da infanoj iĝi civitanoj kaj digne vivi sian vivon sen dependi de publika karitato kiam plenkreska. Dum la kristnaska festo aperis plia eksa lernantino nia, Tania Torres, kiu festis kun ni sian universitatan diplomon en zootekniko, granda defio venkita!

Korajn salutojn kaj Pacon al la Mondo sendas
La Bonesperanoj”



„CLAUS WINTERHOFF - GERMANIO

Mallonga raporto pri miaj personaj spertoj en Israelo inter la 23a kaj 30. decembro 2008

Mia celo estis la urbo Eilat en la suda pinto de la lando ĉe la Ruĝa Maro. La flugo de Düsseldorf duxtras ĝenerale kvin horojn. La urba flughaveno situas je 50 km-a distanco en la dezerto Negev. Per buso oni atingas Eilat-on post unuhora veturado. La urbo aspektas moderna kaj mediteranea. Dekstre oni vidas la enloĝantaron parton sur montflanko, kaj maldekstre, ĉe la maro, situas la hotelkompleksoj, kiuj similas al aliaj en turismaj centroj kiel en la Kanaria Insularo.

Laŭ la strandpromenejo antaŭ hoteloj kaj oficejoj enviciĝas ĉiu speco de vendbudoj de trinkaĵoj, lunĉejoj, memoraĵoj kun multe da kiĉo. Amaso da piedirantoj premas sin tra la stratetoj.

Pro la aktuala festsemajno "Chanukka", libertempis tie multaj israelanoj. La plejmultoj aspektas tute eŭropanaj. Okulkfrapas tamen judoj el afrikaj kaj aziaj landoj. Mia kvinstela hotelo estis granda kvadrata konstruaĵo kun mirinda ena korto plena de palmarboj. La naĝbazeno serpentumis ĉiukŭ la arboinsuloj. Mi ĝuis la enorman selekton de bongusta manĝaĵo. Supozeble ĝi estis "koŝera", ĉar ĉiuj israelanoj tion manĝis. Oni ofertas ekskursojn al israelaj vidindaĵoj. Por esplori la ĉirkaŭon mi preferis piediri aŭ preni buson. Ĉie oni vidas surskribojn en la hebrea, araba, rusa kaj angla. La homoj estas afablaj kaj komunikemaj. La plejmultoj komprenas la anglan. Mi busveturis ĝis la landlimo kun Egipto kaj Jordanio. Kun pasporto oni povas senprobleme eniri.

En la urba muzeo mi informiĝis pri la historio de Eilat. En 1947 Unuiĝintaj Nacioj dividis la ĝistiaman teritorion de Palestino en du duonoj: la araba ento ĉe la rivero Jordano kaj la israela ŝtato kun 56 % de la teritorio. En la jaro 1947 en Eilat staris nur unu domo, la policostacio. Nun ĝi havas 57 mil loĝantojn. Pro tio ke preskŭ neniam pluvas en la regiono, la akvoproblemo estis granda ĝis la konstruo de sensaligaj instalaĵoj, kiuj liveras tage - se mi bone komprenis -27 mil kubajn metrojn da freŝa akvo. Ĝi estas dolĉa kaj senhezite trinkebla. Pri la ĵus komencinta kverelo inter Hamas kaj Israelo oni sentis nenion. La televido kaj ĵurnaloj informis ĉiun tagon pri la okazaĵoj. La politika situacio de Israelo estas tre tikla. Tiun temon mi evitis pro manko de kompetenteco.

Kvankam la suno brilas kaj la temperaturo atingas 26 gradojn aŭ pli, blovas ofte freŝa vento el la nordo. Mi vidis neniun naĝi en la Ruĝa Maro, kiu laŭdire havas nur dek gradojn. Kompense estas agrable bani en la naĝejoj kun 25 gradoj. Por mi la plej granda ĝojo estis vidi la verdon

ene de la dezerto. Grandan arbaron de daktilarboj mi vizitis. Ĉiu arbo estas akvumata gute per tubo.

La kontroloj en israelaj flughavenoj estas tre striktaj. En mia kazo ĝi daŭris du horojn. Mi refluĝis kun ne forgesblaj impresoj - precipe pri la verdo en la dezerto! »



Johano Kalvin kaj la Reformacio

En la jaro 2009-a komenciĝas memorjaroj ĝis 2014, pri Johano Kálvin, je estimo de la 500-a jardatreveno de sia naskiĝo (1509-1564), kaj la 450-a datreveno de sia morto.

Ni rememoros lin pli malfrue. Nun, bonvolu akcepti la historion de la miŝkolca Avas-monta Kalvinana Preĝejo.

JULIO NOVOTNY LA AVAŜ - MONTA PREĜEJO

Kunlaborantoj de la hungarlingva eldonaĵo estis:

Lektoris: Géza Entz

Jozefo Szabadfalvi

Redaktoro: Julio Novotny

Teknika redaktoro: Georgo Ducsai

La fotojn preparis kaj la kovrilon planis: Ede Valent

ISBN 963 00 0523 9

Eldonas la Avaŝ-monta Kalvinana Eklezio

Respondeca eldonisto: Julio Novotny

Prepariĝis ĉe la Borŝod-departementa Presindustria Entrepreno.

Respondeca direktoro: Adalberto Kilián

Esperantigis: Ladislao Pásztor – Miskolc, Hungario

Reviziis: Attila Makay – Oradea, Rumanio

ANTAŬPAROLO

La miŝkolca Avaŝ-monta preĝejo staras antaŭ ni renoviĝante ekstere kaj interne, en sia originala beleco, rezulte de la kvinjara monumenta renoviga laboro. Ĝi estis renovigita multfoje dum sia pli ol duonmiljara historio. La certigo de la grandaj elspezoj ĉiam povis sukcesi nur per helpo de la urbo kaj lando. Dankvekanta fakto estas, ke ankaŭ nuntempe la dekdu milionan koston de la laboroj, inter 1976-1982-aj jaroj, la urbo Miskolc kaj la landa artobjekta intendantejo certigis.

La formiĝo de sorto de la urbo kaj la regiono speguliĝas en historio de la preĝej-konstruaĵo: ĝia pereco aŭ rekonstruiĝo estas la atestanto de la peza provo, aŭ ĝia sort-pliboniĝo. La preĝejo kiel arkitektura kreaĵo kaj ties interna meblaro: gardas la memoron de la diversepokaj-arto, interpretas ties spiritan heredaĵon al la nun vivanta generacio. Kiel elstara artobjekto, reprezentas alte taksitan valoron al nia tuta hungara popolo. Ne miraklas, se pro ĝia sorto, nia tuta popolo interesiĝis kaj interesiĝas sen diferenco de mondkonceptoj aŭ ekleziaj trajtoj. Sed la preĝejo de la monto Avaŝ estas ankaŭ anima-spirita heredaĵo por la kalvina-kristanoj. La reformatoro Matiaso Dévai Biró disvastigis la ideojn de la reformacio en ĉi tiu preĝejo en 1543. Kiam la preĝejo neniigis en 1544 pro turkdetruo, post la rekonstruo de 1566, la diserva ĉeestantar-vivo reorganizigis laŭ la spirito de reformacio. La pura, biblio-inspirita prediko efikis daŭre vivdonanta al la urba loĝantaro. Dum la ekiranta kontraŭreformacio ĝi persistis je la reformita kredo. Dum la ŝanĝiĝintaj epokoj, denove kaj denove ĝi travivis la neceson de la animaj renaskiĝoj kaj akceptis ilin. La kalvinaneco de Miskolc plenumis gravan rolon en vivo de la Ĝis-Tibiska Kalvinana Episkopujo. Ĝiaj animpastoroj venis el vicoj de la plej bone edukitaj pastoroj. Eĉ inter ili kelkaj plenumis ankaŭ episkopan oficon. Post la eldonita imperiestra ukazo en septembro de 1859, la reprezentantoj de la ekleziodistrikto kunkolektiĝis en tiu ĉi preĝejo por diskuti pri la fendaĵoj. Kiam ili protestis en tereno de la eklezia vivo pro la imperiestra despotismo, ili nerekte servis ankaŭ la intereson de la popolo.

La vizitanto plenrajte pretendas la fakan gvidadon, ja la pasinto povas iĝi vere riĉiga parto de nia nuntempa kultura-vivo nur tiamaniere de la renovigita preĝejo. Meritu dankon pastoron Julio Novotny, kies aŭtentika verko prezentas antaŭ ni la preĝejhistorion, konigas ties arkitekturajn, artajn kaj ekleziajn valorojn. Per la precize kunkolektita materialo, donas ne nur al vizitantoj direktigon, sed signifas ankaŭ helpon al la sciencaj esploristoj.

Miskolc, novembro de 1981

László Kürti
Kalvinana episkopo

ANTAŬ PAROLO AL LA DUA ELDONO

Post la renovigo, nia praa preĝejo – ankaŭ de ekster niaj landlimoj – iĝis en centron de eksterordinare granda interesiĝo. Ĝia kunestanta, ĝoja evento estis por ni, ke nia kvinmil ekzemplera eldonaĵo tute elĉerpiĝis dum unu jaro. Ni ŝuldas dankon al niaj ekleziaj kaj mondaj aŭtoritatoj, sociaj-organoj, same al la Borŝod-departementa Presentrepreno, ke ebligis ĝustatempe realigi la duan eldonon.

La esence ne ŝanĝita eldonaĵo nur tiome modifiĝis, ke inter la kolorajn fotojn ni enigis la eksterordinare bone sukcesitan artan foton de la fotoartisto Ludoviko Dobos / O.M.F. / kiu senkondiĉe riĉigas la bildaron de la libro.

Kiam ni publikas la duan eldonon, ni deziras, ke la libro restu utila memoraĵo por la preĝejvizitantoj kaj ĝi povu esti invitilo al la vasta publiko, kiu ankoraŭ ne konas nian valoran artobjekon.

Julio Novotny

ENKONDUKO

Miskolc estas la dua plej granda urbo de nia patrujo. Inter ĝiaj artobjektoj perle pompas la praa kalvinana preĝejo, determinanta la pejzaĝaspekton sur la norda plataĵo de la 234 metrojn alta monto Avaŝ. Ĝi regas la regionon, gvatanta al la vivo kaj krea laboro de la svarmanta urbo, same kiel la apud-staranta, pentrindefika sonorilturo, uzata longtempe kiel urbemblemo. La ĉirkaŭaĵo, kie estas la plej malnova tombejo de la urbo, akcentas ĝian karakterizan belecon. Ĝia situo kaj ties artobjektaj tomboŝtonoj memorigas nin al la fama tombejo „Házsongárdi” de Kolozsvár./ hájongárda tombejo de urbo Cluj en Rumanio/.

Ni klopodas kompili kaj publikigi la historion kaj priskribon de la artobjekt-komuno, 1 kiu estas en centro de la larĝskala atento multfoje vizitata de la turistoj, havante signifan fremdultrafikon. 1 Ni povas kompili ĝin el indikoj de la riĉa literaturo, kiuj plurfoje unu al alia kontraŭdiras, kiuj staras je nia dispono; Sen de fontverka kritikpretendo, ni kompilas simple per la akordigo de la probableco, sed per konsidero de la plej novaj esploroj. Dum pretigo de nia eseo tiu impresio elformiĝis en ni, kiu klarigis, ke serioza kaj granda tasko atendas ankaŭ plie la detale-sploristojn. Ni konfirmas la konstaton de la miŝkolca historiisto-instruisto Ludoviko Marjalaki Kiss, bonega konanto de historio de nia urbo, „Bedaŭrinde nur en la disĵetitaj dokumentoj, la fragmente postrestintaj memoraĵoj, ĵetas palan lumon al la pli malnovaj tempoj.”

/ Marjalaki Kiss L. 1927. 1. /

La priskriboj, dokumentoj – havantaj fidindajn indikojn – de la 13-15. jarcenta eklezio, iĝis viktimoj de: grandegaj incendioj, inundoj, detruoj de la surprizatake, ripetante aperantaj tataroj kaj la ĉi tie patrolintaj turkoj kaj la germaninvadantoj. Bonŝanca cirkonstanco estas, ke niaurbaj protokoloj pluekzistis de 1569, do, ili konserviĝis de la ekradikiĝo de la reformacio, kaj ili liveras fidindajn objektajn kaj personajn indikojn. Ĉi tiuj notoj des pli valoras, ĉar la urba konsilantaro prizorgis la aferojn kaj de la eklezio kaj de la preĝejo dum jarcentoj.

Tiel la vivo de la komunumo, progresanta el vilaĝo al urbo, havis striktan rilaton kun la historio de la preĝejo. Ĉi tiu kontakto ekzistis ĝis la 18-a jarcento, kiam en la vivo . partoprenis jam de la urbo ankaŭ alireligiaj civitanoj

Tial necesis la 28-an de decembro 1735, fondiĝo de la Konsistorio, ĉar la ĉefoj de la urbo: „.....pro multaj mondaj okupitecoj ne povis atenti al gravaj aferdaŭrigoj de nia Sankta Eklezio kaj la atendebla atentemo ĉirkaŭ nia Lernejo-konstruo. Tial estas menciata la peto al estigo de deĵora servado de la Kuratoria Konsistorio.”/ Ejkv. 1735. 1. /

Post la fondiĝo de la Konsistorio ekde la jaro 1735, la garditaj protokoloj kaj de 1780, la garditaj matrikuloj, donas valoregajn kaj fidindajn indikojn. Ĉi tiuj detale gardas kaj priskribas la historion de la lastaj ducent jarojn pri la preĝejo, sonorilturo kaj tombejo. Bedaŭrinde dum la 1781-jara, granda bruliĝo, la granda parto de la eklezia arkivo neniigis. Ne scieblas, kia valora fontmaterialo koncerne la pasinton iĝis viktimo de la fajro.

/ Sonorilturo /

HISTORIO DE LA PREĜEJO

La malfruaj posteuloj supozas scii, ke sur la plataĵo de la Avaŝ, super la loĝloko, preĝejo stareblis jam en la 13-a jarcento, kiun konstruigis eble guberniestro Stefano, filo de la Borŝod-departementa, Ākoŝ-genta guberniestro Ernye. Li savinte la vivon de reĝo Adalberto la IV-a, dum la tatarinvado, donace ricevis la fortikaĵon de Diósgyőr. Oni komencis la konstruadon ĉ. 1260 kaj finis ĉ. 1281. Stefano posedantsinjoro de la fortikaĵo

de Diósgyőr tre elstariĝis el siaj samepokanoj, pro sia profunda kredo, per grandmezura subteno de la eklezia vivo. Li fondis la paŭlanan monaĥejon de Diósgyőr kaj same sur la plej bela altaĵo – en Szentlélek – la paŭlanan klostron. Koncerne la sanktan patronon de la preĝejo, ne troveblas aŭtentika dokumento, sed laŭ la tradicio, ĉar la guberniestro Stefano havis kiel sanktan patronon; la reĝon Sankta Stefano; oni konstruis la preĝejon, aŭ nur la pli malgrandan kapelon, al estimo de Sankta Stefano. Tiel ni povas renkontiĝi en kelkaj ĉartoj, dokumentoj kun la nomo: „preĝejo de Sankta Stefano „eĉ ankaŭ en sekvantaj tempoj, post la disvastigo de la reformacio. Tiel oni scias, ke guberniestro Stefano regule vizitis la preĝejon, kaj kune kun siaj familianoj ofte ĉeestis la pian-ceremonion. / Szendrei J. II./1890/31. Li supozas, ke la palatino Stefano; familiano de Ernye, estas entombigite en ĉi tiu unua preĝejo./ La malgranda ejo akceptis la preĝantan popolon de la vilaĝo nur dum kelkaj jaroj, ĉar en 1285, en Boršod denove militvagadaj nogajaj tataraj trupoj, detruigis la tutan departementon, domaĝinte eĉ Miŝkolcon. Ĝiajn pajlofasklajn tegmentojn bruldifektis, ĝian preĝejon detruis ĝis la tero. Ĝia popolo fuĝis en arbarojn kaj grotojn de montaro Bükk. La loĝloko senhomiĝis./ La popolo nomis ankaŭ la turkon al tataro. Kvankam la legendo plie menciadas pri „hundkapa tataro”, pro tiu ni povas konkludi al la eta, migdalokula, azia, nogaja tataro./

La tradicio parolas ankaŭ pri tiu, kaj tiu onikredo daŭris dum jarcentoj – sed malprave, ke la husanoj ekloĝante en Boršod, konstruis la preĝejon. De miaj geavoj ankaŭ mi aŭdis ĉi tiun plurfoje el karaj legendoj. Sed tiu estas konfirmebla nek historie, nek arto-historie.

LA UNUA KAJ LA DUA PREĜEJO

Tiom certas, ke jam en la Árpád-epoko, pli precize, en la 13-a. jarcento ĉe subo de la Avaŝ, ankoraŭ tre malgranda vilaĝeto: / Wenzel A., 201./ Miscoucy jam ekzistas. Oni scias pri ĉi tio, el ĉarto farita en 1245. Ankaŭ tio estas atestite akceptebla, ke sur la loko de la nuna preĝejo, laŭ la tiama modo, romanstila preĝejo aŭ kapelo staris kaj ĝi servis la animpretendon, de la entute romkatolika loĝantaro. Sed mallumo kovras la historion de la tataroj detruita preĝejo en 1285. Probeblas, ke se ĉi-tempe la miŝkolcaj kreduloj havis pastron, tiam ili devis havi ankaŭ preĝejon, eĉ se tre etan. Sed ili havis pastron, laŭnome pastron Nikolao. La kodekso, gardite en Romo atestas, ke ĉ. en 1335; la pastro de Miskolc, devis pagi papan imposton kiel papa-dekonon =18 groŝojn./ Marjalaki Kiss L.1927.3./ La Eger-urba kapitula arkivo en 1332, tiel registris la miŝkolcan parokon, kiel sia apartenaĵo. Sed ankaŭ la ekzisto de la proksimaj monaĥejoj / tiu estas klostro: domo de sole vivantaj, ĉefe monaĥoj./ supozas – pro ilia elradiado – la ĉeeston de iumezura preĝejcentran animvivon. Ja ĉi tiu supozas la ekziston de la renovigita dua preĝejo.

Estas historiverkistoj, kiuj ja akceptas fakte, ke en 1281, guberniestro Stefano – la filo de Ernye – vivis, / Marjalaki Kiss L. 1927.4. /sed ili diras ankaŭ tion, ke tamen li ne eblis konstruigi la preĝejon, ĉar la familio Ernye posedis neniom da tero sur teritorio de Miskolc. Tiam kaj ankaŭ poste, la tuta teritorio de Miskolc estis en la mano de la posteuloj de gento Miŝkóc. / Marjalaki Kiss. L. 1927. 4. /

La plej atentinda evento de la 14. jarcento rilate al dua preĝejo, ligiĝas al sorto de la fortikaĵo de Diósgyőr. La tiama reganto de la fortikaĵo, Széchy el Gömör departemento, per la interŝanĝ-kontakto estiĝinte je la kristnaska tago en la 1364-a jaro, transdonas la fortikaĵon al reĝo Ludoviko la Granda, kiu estis tiam la heredonto de la pola trono. Tiel kompreneble, li volis esti pli proksime al la pola landlimo al fortikaĵo de Krakovo. Ludoviko la Granda, pograde investis la vilaĝon per urbaj privilegioj, kiu dum kelkaj jaroj, pligrandiĝis ne nur personnombre, sed ankaŭ materiale kiel parto de la latifundio, pro la

grandaj favoraĵoj, de la enloĝiĝantoj. Kaj tiel imageblas la larĝigo de la dua preĝejo kun la reĝa favoro, ankaŭ en okcidenta direkto.

Oni estis liberaj pri la realigo de siaj planoj, ĉar la reĝo ne certigis por si mem la regant-juron pri la preĝejo, kiam li ekposedis la fortikaĵon de Diósgyőr.

Dum la arkeologiaj malkovroj en 1941, iniciataj de la Muzeo Boršod-Miškolca en la preĝejo, Géza Megay trovis la bazrestaĵojn de la Árpád-epoka/j/ preĝejo/j/. Géza Megay skribis: „Dum la tombomalkovroj sub planko plurloke ni trovis fundamentmurojn. Sub la nun ekzistanta preĝejo oni trovis fundamentmurojn de multe pli malnova preĝejo./ Megay G. 1970. 10. / Ni pensas, ke estas interese citi la konstaton de Géza Megay, pri la ekscita profosado per kelkaj fazoj kaj la prezenton de la, de li preparitaj demonstraĵoj desegnaĵoj.

Ni komencis la malkovron ĉe la orienta fino de la preĝejo, kie la lastaj pilieroj estas. En la areo inter la kvar pilieroj, oni trovis plintojn de duonronde metitaj okangulaj pilieroj de iama sanktejo de la nuna preĝejo. La kvar duonronde metitaj bazmuroj konstruiĝis el ŝtonoj, kiujn oni skulptis angulaj. Inter ĉi tiujn ŝtonojn oni metis kalkohavan sablan morteron. Sed oni uzis ankaŭ sabloŝtonojn.

Apud ĉi tiuj fostomuroj oni trovis iun tutan apartan bazmuron, kies daŭrigo estis tero tiutempe. Pli malfrue oni trovis ankaŭ angulparton de ĉi ties muro, kiu havis norda-sudan direkton. Post la apero de la angulparto, ni trovis daŭrigon de la muro, ankaŭ al okcidento. Ĉi tiuj du masivaj flankomuroj, koncerne la bazmuron, etendiĝis (tra)laŭ longe de ĉefnavo de la nuna preĝejo. Oni konstruis la nunajn grandajn kvarangulajn ŝtipajn pilierojn sur ĉi tiun bazon./ Megay G. 1970. 10. /

„Ĉe la bazo, de oriento je la dua libera piliero de la nordflanka pilieraro, la bazmuro havas anguladon, kiu daŭriĝas al nordo de iu murparto. Ĉi tie estas ekiro de la sanktejon fermanta triumfarko de la iama preĝejo. Sur la suda flanko oni trovis ĉi ties spurojn. La spurojn de la suda kaj norda bazmuro, ni trovis en la tuta longo de la preĝejo, kaj ties okcidentajn ekstremojn ni povis malkovri, preskaŭ ĝis la muro de la okcidenta turo, kiu estis enkonstruite en areon de la nuna preĝejo....Dikeco de la ekrovita malnova bazmuro ŝanĝis inter 110 kaj 200 cm-oj. La bazmuro ĉe la eta sankteja parto estis integra kaj: 581-600 cm-ojn dika. Sur ekstera flanko de orienta muro de la malkovrita eta preĝejsanktejo, ni trovis freskojn, kies restita surfaco estas unu kvadratmetra kaj figuras ruĝbrunan pentritan drapiraĵon....

Estis interesa ankoraŭ, ke la sankteja muraro de la eta preĝejo havis eksterordinaran larĝiĝantan bazon al oriento, el ĉi tiu elstaris la jam menciita sanktejbazmuro, kiu estis 250 cm-jn larĝa. Laŭ nia supozo; ĉi tie estis iu orienten rigardanta kapelo, aŭ tombigejo, kies pordo rigardis al oriento. Verŝajne estis sur la muro ankaŭ fresko, kies restaĵojn ni ektrovis...../ inter ĉi tiuj / fostobazmuroj kaj sur ceteraj lokoj ni trovis multe da skulptitaj ŝtonoj, enkonstruite la duan fojon.” / Megay G. 1970. 11. /

La enkonstruitaj kalkopecoj devenas, ne el minejo sed tiuj estas disŝutite trovitaj kunkolektitaj konstruaj materialoj, tiun pravas, ke oni permane formis ilin. Estis atentbla ankaŭ tio, ke ĉe la orienta muro de la sanktejo kaj ĉe la ceteraj partoj de la muroj estis kaj sabloŝtonpecoj kaj andezittufopecoj.

Megay opinias jam klarigite laŭ la rezulto de la malkovroj, ke la duonronde metitajn kvar pilierojn de la 15- jarcenta preĝejo, oni konstruis sur bazmuron de la sanktejo de Árpád-epoka/j/ preĝejo/j/.

Ĉi tiun ni povas vidi ankaŭ sur desegnaĵo.

Laŭ Megay mezuro de la eta preĝejo estas:

Interna larĝeco	7,43 m
Longeco de la navo	19,40 m
Longeco de la sanktejo	8,10 m

Tuta longeco de la preĝejo estas sen turo 27.5 m, ja, la turo ne koncernis detalon de la malkovro./ Megay G. 1970. 11. /

Dum la malkovro oni trovis ŝtonpecojn, pri kiuj evidentiĝis, ke parto de ili okulfrape similas al tiuj ŝtonskulptaĵoj, kiujn oni trovis en Árpád-epoka preĝejo de Noszvaj. La el antaŭa/j/ preĝejo/j ŝtonskulptaĵoj estas rigardeblaj en ŝtonmuzeo de la preĝejo.

Ni supozas, ke la bazo de la eta kapelo aŭ tombigejo, supozita konstruaĵo de Megay, estas la sama al bazo de la eta preĝejo, detruita de tataroj en 1285; koncerne al bazo de la dua preĝejo konstruita en 14. jarcento. Sed ĉi tiu, koncerne 14. jarcenta preĝejo, ne havas pruveblan atestilon. Cetere, detalojn de historio de la Avaŝ-montosuba urbo kaj de la preĝejo, kovras malklareco.

Atentinda estas opinio de Géza Entz, kiun ni citas: „La plej duba parto de historio de la preĝejo estas la antaŭaĵo de la grandskala elkonstruado antaŭ la jaro 1489.. Tiel ŝajnas, ke en dua duono de la 13-a jarcento, konstruiĝis vilaĝkarakterata eklezio, en kiu Stefano, la palatinö /Ákoŝ-gentano/ havis gravan rolon. Ankaŭ la sanktigado al reĝo Stefano aludas pri tiu, ja la palatino konstruigis la preĝejon je estimo de lia patrono. Sed estas tre duba la formo de la konstruaĵo. La supervidaĵo de Adalberto Horváth, ne akceptebla. estas Laŭ juna A. Horváth. Historio de konstruado de la preĝejo havas sep eraojn: 1. mezo de 13. jc.; 2. 1250-1350.; 3. 1365-1411.; 4. 1470-1489.; 5. 1560-1569.; 6. 1690-1792.; 7. fino de 19. jc.

Vö: pli juna A Horváth, 1964.15./ Kiun li nomas frua preĝejo, tiu estas fundamentado de pilieraro de la 15-jarcenta, ankaŭ nun estanta konstruaĵo. Do, estas sendube, ke Géza Megay ektrovis la estantan arkofermiĝon, sur orienta flanko kie estas la bazoj de du, pli proksime apudaj estantaj pilieroj. La 1941.-jara malkovro de Megay, estas la plej fidinda, konvene la plej fruan preĝejon. Li trovis en la orienta interno, proksime ĉe la nun estanta lasta orienta pilierparo, rektan nord-sud-direktan muron. Ĝi aludas al tio, ke la sanktejo de la unua preĝejo, eble rekte fermiĝis. Ĉi tiu estis la plej ŝatata solvo en dua duono de la 13-a jarcento. Ĉi tiun muron ankaŭ Stefano Feld ektrovis. La aferon faras duba, la situo de la, de Megay trovitaj muraj bildoj kaj tiu grandioza bloko, kiu aliĝis al la menciita muro, de orienta direkto. Ĉi tiel povis paroli Megay pri ses metran dika muro, kiu ne estas ebla. Ĉi tiu ekstera murobloko verŝajne estis iu pli malfrua fundamentado, kaj tute ne provis aparteni al la 13.-jarcenta, supozita preĝejo.

Post ĉiu ĉi la momenta rezulto estas konstatebla sekvamaniere: Verŝajne ekzistis, iu 13.-jarcenta preĝejo, kiun ni ne konas. La, de Megay trovita muro – se ĝi apartenis fakte al la frua preĝejo – ĝi ŝajnas esti ĉi ties rekte fermiĝinta sanktejo. La ankaŭ nun staranta kaj ĉ. en: 1400 konstruita turo, aliĝis al la frua konstruaĵo. Ties ekzisto, aludas al 14.-jarcenta, pli frua preĝejo. El la pli fruaj tempoj nur turo restis kaj ĝi adaptiĝis en la 15.-jarcentan preĝejon.

Patricinion de la preĝejo unue mencias, la plurfoje citita kaj grava 1411-jara privilegiletero de Sigmundo. Neniu kaŭzo neas esti aplikebla ĉi tiu indiko, konvene al la pli frua eklezio.” / AEL. 320/981./

- ni daŭrigos -

En la Internacia Memortago de la Holokaŭsto en la Juda Tombejo de Miskolc

En la Internacia Memortago de la Holokaŭsto, la 27an de Januaro 2009 la geedza paro Pásztor faris pietatan viziton en la Juda Tombejo de Miskolc. Dum la vizito de la tombejo sur monto Avas kaj interparolado kun la prezidanto de la religia komunumo, Jenő Freŭd pri la

Izraelida Paroĥo, ĝiaj preĝejoj, ceteraj establaĵoj kaj kredantoj vivantaj en la nuna Miskolc ni eksciis jenon:

La enloĝiĝo de la unuaj judaj familioj en Miskolc komenciĝis post tiu de grekaj komercistoj. Komence la urbo havis eĉ tri judajn tombejojn, sed nun funkcias nur tiu sur la Avas-supro. Ankaŭ da preĝejoj ĝi havis du, sed nun staras nur unu: en la strato Kazinczy. Ĝi havis antaŭ longe du ritajn banejojn, sed nuntempe staras nur unu tia konstruaĵo sur la teritorio de la Paroĥo. La konstruaĵon de la malnova juda pedagogia instituto la paroĥo ne ricevis post la dua mondmilito. Nuntempe ĝi estas la proprietaĵo de la financoficejo APEH.

Ĉi tiu tombejo en Miskolc atingeblas perpiede dum dek minutoj de la Belvidejo sur Avas ekirante de la finstacio de la aŭtobuso n-ro 32. Ĝi situas sur la Avas-flanko, rigardanta al la Ferfabriko. Pri ĝia bontenado sorgas la Izraelida Paroĥo.

La grundon de la tombejo aĉetis la paroĥo de la urbo antaŭ 200 jaroj en la dua duono de la 1700aj jaroj. En 1863 ĝi estis ĉirkaŭbarita. Hodiaŭ ĝi enhavas 18000 tombojn. Ĝi havas artmonumentan protekton. La Arĥivo de Miskolc faris antaŭ nelonge datumkolektadon kun religihistoria celo surbaze de la hebreaj surskriboj de la plej malnovaj tomboŝtonoj.

Kremaciitajn mortintojn oni ne sepultas, ĉar ilia religio malpermesas tian enterigadon. Sub ĉiu tombamaso ripozas nur unu homo, super-enterigo ne okazas. La tomboŝtonoj estas direktitaj al oriento. La enterigado estas plej simpla, ĝi okazas ankaŭ nuntempe en tabulĉerko sen ajna ornamo, en blanka mortotuko kaj sen valorobjektoj.

Bedaŭrinde la grandan familian kripton de Jenő Pollák jam dufoje trudmalfermis malpiaj manoj serĉante valorobjektojn. La postsignoj de la vandalaĵo ankaŭ nun vidiĝas. Ni trovis latinliterajn tomboŝtonojn ekde la jaro 1843. La tomboŝtonoj estas skulptitaj parte el sabloŝtono, ekspluatata en Kisgyőr, parte el nigra granito, griza aŭ blanka marmoro. Sed plejparte ili pretiĝis kaj ankaŭ nun pretiĝas el betono. La marmoraj tomboŝtonoj ornamas la tombojn de pli bonhavaj mortintoj. Sur la tomboj ne estas floroj. Memore de siaj vizitoj la homoj metas malgrandajn ŝtonojn kaj ŝtonerojn sur la tomboŝtonojn. Ni vidis tiajn. Post la Holokaŭsto revenis ĉi tie proksimume la dekono de la deportitoj. La paroĥo nun nombras 500 personojn. Enterigo okazas nur malofte, la lasta estis en 1999.

Ni vidis kelkajn tujojn laŭlonge de la vojo, kondukanta de la tombeja enirejo. Pli da ĉiamverdujojn ne, ĉar la tuj sub la tersurfaco kreskanta radikaro detruus la tombojn. Sur la tombo de eminentuloj estas samtiel aprezaĵoj, kiel en kristanaj tombejoj. Ni vidis ankaŭ belajn tomboversojn, esprimantajn la dolorojn de la postrestintaj parencoj kaj honorigon de la mortintoj.

Ekzemple ni legis jenon sur la sekva ŝtono:

„Edzino de Henrik Pollák

Regina Máj

1855-1903

Jen polvas en ĉi tombo fidelo kaj amo,

Boneco, simpla, pura virinmoralo,

Ŝi estis vivkunulino kaj patrino,

Pli ne volis, ŝiaj estis por ŝi ĉio ...”

Ni ne sciis pli frue, tial surprizite ni vidis, ke ĉi tie oni kolektis el pli grandaj loĝlokoj de norda Hungario la monumentojn, starigitajn por la viktimoj de la Holokaŭsto.

Inter ili ni trovis:

la monumenton de la 14000 judoj, martire mortintaj en la jaroj 1939-1945, la monumenton de la 37 judoj, murditaj la 24an de Oktobro 1944 en la kampodomo Gado apud vilaĝo Mályi, krome la monumentojn, starigitajn memore de la deportitoj el Abaújszántó, Erdőbény, Encs, Mezőkövesd kaj Ózd. Ilin kolektis la Miskolca Paroĥo, ĉar oni ne sentis ilin en sekureco en ilia originala loko. Sed troviĝas tia komunumo, kiu fotinte la ĉi-tiean monumenton starigis memoraĵon en la originala loko por la deportitoj.

Sur la monumento de la Miŝkolcanoj ni legis:

„Jen la memorkolono de niaj dek kvar mil judaj fratoj, deportitaj, martirigitaj, murditaj de la malhumana judmalamo per gaso, fajro, kuglo, malsatmorto en Auschwitz kaj en ceteraj mortokoncentrejoj, laborservo kaj sur landvojoj de Eŭropo en 1944-1945.”

Ni deziras, ke la viktimoj de la Holokaŭsto ripozu pace!

Ni deziras, ke neniam plu okazu tia teruraĵo!

Artikolon de Geedzj Pásztor /Miskolc/ esperantigis Jozefo Horvath Győr

Ni funebras

„Malgaje mi plusendas la anoncon:

Sekretario - Farkas, László – de la Eger urba „Verda Stelo” Esperanto-grupo, mortis tragike rapide, netendite, la 30-an de januaro 2009a. Li estintus nur 52 jaraĝa, je la 16.an de februaro 2009.

Szilvási”

Membroj de la Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos”, nun kondolencas al la familianoj kaj al la Esperanto-grupanoj, pro forpaso de nia elstara samideano s-ro Farkas, László (1957-2009).

Lia koro estis oro,
marmoro la karaktero.

Li, por ni restos
la eterna ĉielarko.

Adrienne, s-rino Pásztor

D-ro Ferenc Jáki

Sur montopint' fajrera

Kiu la krutegan vojon jam trapasis,
sur la neĝkovrita montpinto ekstaris,
plenigis l' animon dialana Bluo,
vidis, kia estas la „Platona Belo”,
tiu jam ne emas iri en profundon,
en la konfuzeman, kirlan fi-malhelon.

Kaj kiu sur la pint' spektis al Ĉielo,
sentis flugilojn kaj flugis al Senfino.
Tie kunfandiĝas kun azura Brilo
kun milda Pac-sento, kun sfera muziko,
sentis en proksimo „Alfan”, la Komencon,
kaj ekstaze tie komencis la preĝon:
„Vi estas „La” Penso, Kiu sin mem pensas,
en Kiu indikoj ĉiujh kune estas.
Samtempe Vi estas Leĝo Gravurita,
Centrifug-petala denfina Praforto,
ekvilibron dona Dubraka levilo.

Arkimeda Punkto en la Universo,
senfina Faden' en senfina Takelo...
Per unika „Verbo” ĉion moviganta,
senmova Motoro, Ĉiopov' eterna.
Per vi iras ĉio, kio jen, moviĝas,
Giras kaj rondiras, pulzas kaj eksplodas...

Vi ĉeestas en la brula roz-arbusto,
en la flama-fuma kolono sur Stepo,
falanta manao de sur Ĉielo,
en la elŝprucanta Fonto el la roko.
Justa Juĝisto kaj indulgema Patro,
al kiu revenis la prodiga filo...

Vi estas, ho Diio, ĉion pleniganta,
por la homo homoan formon surmetanta.
Laŭ via vizaĝo kreis Vi min iam,
kun dezir' profunda greftis memon mian,
por ke mi atingu la pinton de Fido,
kaj de tie flugu mi al via Sino.

/Ferenc Jáki/Marianna Legányi: Kantante Vivi-Poemvolumo - Eldonita en Szolnok-2006/

TIBOR SEKELJ

TEMUĜINO, LA FILO DE LA STEPO

Tradukis Terezija Kapista

La titolo de la originalo TEMUDŽIN – DEČAK STEPE
Eržebet Sekelj, Subotica
Lektoris, la poemojn tradukis kaj la titolpaĝon desegnis: Marko Petroviĉ
Ilustris: Hunor Ĝurkoviĉ
Kompostis: Dimitrije Janiĉiĉ

Eldonisto TEREZIJA KAPISTA
Novi Beograd
Studentska 39/23
Jugoslavio
1993.

Presis: SZR sava Todorov, Dubrovačka 3 Beograd
Eldonkvanto:500

Parto kvina

Kun la ligna kolumo

En la plejdena parto de arbaro Temuĝin faligis kelkajn arbojn kaj el ili haste konstruis defendan rempar-digon. Tra nerimarkeblaj truoj inter la foliaro la sagoj flugis al Tajĉiutoj kaj ili pro tio ne povis proksimiĝi, por eniri la provizoran fortikaĵon kaj kapti la defendantojn. Post kelkhora interbatalo, el kiuj Tajĉiutoj eliris venkitaj, ilia estro ekkriis:

- Donu al ni nur Temuĝinon kaj ni lasos la ceterajn liberajn, ili ne interesas nin.

Ili volis kapti Temuĝinon kiel la estron de familio kaj tiel tute pereigi la familion.

Sed la patrino kaj la unuecaj fratoj tion ne volis permesi. Ili donis al Temuĝin la ĉevalon kaj li forkuregis profundon de arbaro.

Tajĉiutoj rimarkis tion kaj postkuris la fuĝanton, sed rapide perdis lin el vido. Kvazaŭ perdiĝis ĉiu lia spuro.

Tri tagojn pasigis Temuĝin en arbaro, sen manĝo kaj trinkaĵo. Dumnokte li tremis pro la malvarmo, ĉar estis ne preparita tranokti en arbaro. Li firme alpremiĝis al la korpo de sia ĉevalo, kovrante sin kaj la ĉevalon kun unusola lankovrilo. Li konsideris ĝin kamarado, kun kiu li dividu la bonon kaj malbonon. En matenkrepusko li lasis la ĉevalon paŝti freŝan herbon, kaj li mem lekis roson de sur la folioj kaj tiamaniere mildigis iomete la soifon.

La kvaran tagon la junulo konsideris, ke iliaj malamikoj ĉesis la peladon kaj ke pasis la danĝero por li. Li decidis forlasi la nekonvenan rifuĝejon kaj ekrajdis al rando de arbaro.

Tiam subite malfermiĝis la selozono kaj komencis flanken gliti. La rajdanto teren saltis. Dum li korektis la selon, firmigante la zonon, li ekpensis, ke tio ŝajnas esti iu malbona antaŭsigno. En tiu epoko en Mongolio, samkiel en aliaj landoj, regis superstiĉeco, en plej parto da vivo, estis al li ne malfacile vidi en tiu okazaĵo, atentigon por ne daŭrigi sian vojon, ĉar la malamiko kaptus lin.

Li rezignis sian decidon kaj reiris en profundon de arbaro. Tie ĉi Temuĝin pasigis plurajn tri tagojn kaj noktojn. Nun li jam estis tiome malsata, ke li komencis maĉi iujn radikojn. Li serĉis arbarajn berojn, sed ne multon sukcesis trovi. Ili kutime maturiĝas ĉe la rando de arbaro, kaj malofte en ĉiama ombro de mezarbo, kien la sunradioj ne penetras. La soifon li plu mildigis per matena roso.

La sepan tagon li decidis provi sian fortunon kaj eliri el rifuĝejo. Nun bone li seligis la ĉevalon por ke la zono denove ne malfermiĝu. Ekis li al rando arbara.

Sed jen, denove io okazis. Dum li pasadis apud ŝtoneta monteto en arbaro, roko granda preskaŭ kiel tendo derompiĝis kaj glitis antaŭ lin, ferminte lian vojon.

Temuĝin firme streĉis la bridon kaj la ĉevalo haltis tuj. La junulo fikse, longe rigardis tiun novan signon. Por superstriĉa homo ĝi povis enhavi nur unu mesaĝon: Ne iru, malbono minacos vin. Li oponiis, ke la naturo – lia protektanto – mem zorgas, ke al li nenio malbono okazu.

Li returnis la ĉevalon kaj reiris arbaran profundon. Ie-tie li aŭdante birdan pepadon divenis, ke ili salutadas lin, dirante: Bonvenon, amiko! Bone, ke vi revenis!

La radikoj, kiujn li sukcesis elterigi, nesufiĉe nutris lin. Li kolektis plenmanon da fungoj kun intenco baki lin, sed kiam li prenis la silikon por fajrigo, ekmemoris, ke la fumo povus altiri la malamikojn kaj rezignis tion. Tiel li preterlasis ankaŭ la eblecon por satiĝi. Kaj de tago al tago li ĉiam pli perdis la forton.

La junulo sidis, apogante sin al arbo kaj klopodante per kantado mallongigi sian tempon. Sed neniu kanto venis en lian kapon, li nur balbutis tion kio venis el profundo de lia animo:

*Panjo mia, kuraĝa, fidela,
franjo bela kiel tago hela,
miaj fratoj, junaj kavaliroj,
Ĉe la vivofin' ĉu mi vidos vin?*

Kiam li finis tiun ĉi tristan penson, eksaltis komencante promenadi tra arbaro. Al si parolis:

„Mi ne aŭdacu-malesperi! La vivon oni devas pasigi ĝis la lasta momento plenespere. Se mi apatios, mi ne savos min!”

*Kaŝas min arbaro, amiko fidela,
foliarsusuro, birdpepado diras:
-Ho radikoj, roso, preventu pereon,
kiun malamiko al li nun deziras!*

Temuĝin resentis sin kuraĝa, komencinte kredi ke ĉio bone finiĝos. Li decidis morgaŭan dekan tagon, de sia restado en arbaro, denove provi bonŝancon kaj forlasi la rifuĝejon. Li estis konscia, ke pli longa restado elĉerpos lin pli forte, ke li estus senforta ĉevalon ekrajdi.

La dekan tagon en aŭroro la junulo rajdis laŭ la konata vojo, ĉirkaŭpasante la elfalitan rokon, kiu antaŭ kelkaj tagoj baris lian vojon. Tra branĉaro li ekvidis la stepebenajon kaj preparis sin ekkuregi plenrapide.

Sed li tion ne realigis.

Tajĉiutoj starigis gardistojn ĉirkaŭ la arbaro, atendante, ke Temuĝin aperu. Tioma estis ilia kolero, ke eĉ post dek tagoj oni ne ĉesis gvati lin.

Ili postkuregis kaj kaptis lin. Ili ligis liajn manojn kaj tiel eskortis lin al la jurta kolonio de Tajĉiutoj.

Tajĉiutoj ne sciis kion fari kun sia kaptito. Ĉu murdi lin? Ne, tion ili ne volis. Tio estus tro simpla fino de tiu longa obsedo kaj iu povis riproĉi pro la nehomeca maniero.

Oni decidis, ke la kaptito pasigu po unu tagon ĉe ĉiu familio, ke ĉiuj anoj de tribo havu eblecon por lin torturi. Por ke li ne povu forfuĝi kaj por pli amarigi lian vivon, ili metis „lignan kolumon”, kiu konsistis el kvar bretoj kunnajlitaj unu al alia, firme ĉirkaŭ lia kolo.

Tiel ili peladis Temuĝinon el unu jurto al alia. Ili nutris lin ĉefe per la rubnutraĵo. Sed tiu nutroajnaĵo - post naŭtaga fastado - ŝajnis vera festenaĵo. Temuĝin iom-postiome sufiĉe revigliĝis kaj revenis lia antaŭa forto. Tie-ie eĉ batas lin, donante finomojn kaj molestante lin ĉiamaniere. Ĉion-ĉi li toleris revante pri tiu tago, kiam li liberiĝos.

Verdire, ekzistis tiuj jurtoj, kie iu kompatis lin – kaj kiam aliaj forestis - li ricevis eĉ bonan manĝaĵon kaj konsolvorton. La tagoj pasadis. La volo de Temuĝin ĉiam pli hardiĝis. La turmentoj pli kaj pli facile estis elteneblaj kaj samtempe kreskis lia libersopiro pli intense. „Se mi postvivos, tion ĉi, mi revenĝos,” li parolis al si mem.

Tiel alvenis la Tago de la Plenlumo, per kiu la Mongoloj celebras la komencon de somero. Tiun tagon oni kutime celebras solenege en jurtejoj kaj en la solecaj jurtoj. Ankaŭ la Tajĉiutoj oni preparas la celebron.

Hej! Alvenigu ankaŭ tiun bubaĉon, - ekkriis unu el festpreparantoj - vidu ankaŭ li, kie ni celebras nian feston.

Ili elkondukis la kaptiton sur vastejon inter la jurtoj, kie li povis observi de flanke, kie la hejmanoj eksidis sur lankovriloj, po grupe. El ĉiu jurto ili ekportadis la manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kaj la regalo kontinuis. Unuopaj grupoj kantis plenvoĉe kaj antaŭ ilia jurto iu ekmuzikis per „morin hur” arĉa instrumento, simila al guzlo, akompanante kantis malnovan kanton pri herojoj.

Temuĝinon gardis iu stulteta junulo al kiu estis ordonite ne perdi lin el vido. Fojfoje iu ĵetis al li peceton de ŝafviando, ankaŭ ujon da kumiso, tiel eĉ li, en tiu tago, ne restis malsata.

- Ho, se mi estus kun mia familio - pensis li - ni ankaŭ celebrus tiun ĉi tagon. Kiel ĝoje kantis mia patrino kantojn el sia infanaĝo, kaj ni aŭskultus. Certe ni havus ankaŭ la gastojn.

Vesperigis. Ĉiuj ebriigis pro arĥio kaj ankaŭ la gardisto de Temuĝin apenaŭ povis stari surpiede.

Tiam ekbrilis ideo en juna kaptito: nun estas eksterordinara ŝanco ion entrepreni por mia libereco.

Per ligna kolumo li forpuŝis sian gardiston kaj - antaŭ ol iu ajn rimarkus tion, li eskapis.

Unue li ekiris al la arbaro, sed rapide li rememoris, kiel oni jam kaptis lin foje tien. Tiam li subite returniĝis al rivero Onon, kiu fluis je kelk cent metrojn fore de jurtejo.

Li plonĝis en akvon, tro malvarman en tiu sezono. Adaptiĝinte al la malvarmeco, li fornaĝis ĝis rivermezo kaj tie flosis surdorse. Tiel flosante li restis senmova. La ligna kolumo tenis lin sur akvosurfaco.

Kiam la Tajĉiutoj resobriĝis, ili ege koleris.

- Kio? Ĉu tiu povrulo trompu nin? - ekkriaĉis iu. - Neniam ni tion permesos. Nun ni montros al li, kiuj ni estas.

- Plej bone estas, ke ni tuj disiru en ĉirkaŭaĵo - ordonis la plej aĝa jurtejano. - Ĉiu bone rigardu sian parton. Li ne povus tro malproksimiĝi kun tiu kolumo.

Oni disiris ĉiudirekten, rigardadis malantaŭ ĉiu arbo. Eĉ surarbe ili rigardis eble li supren eble li supren grimpis. Sed nenie li estis.

Unu el Tajĉiutoj, kiu nomiĝas Sorkanŝira, traserĉis riverborden. Subite, li rimarkis, ke io naĝas mezrivero. Li envadas akvon kaj laŭ lunlumo li ekkonis la kaptiton kun ligna kolumo. Aliĝinte li parolis:

- Estas en ordo, junulo! Ĝuste pro via saĝeco kaj pro la fajro en viaj okuloj la Tajĉiutoj envias al vi. Restu tie, kie vi estas, mi ne perfidos vin.

Temuĝin ne respondis, kvankam li estis surprizita pro la homeca konduto de malamiko rilate al li. Liaj dentoj klakis pro malvarmeco kaj duonglacia montara rivero. Li sin demandis, kiom longe li povos elteni tiel.

Post ioma tempo la pelantoj komencis reiri al jurtejo. Ĉiuj revenis kun malplenaj manoj. Kiam ankaŭ la lasta revenis oni insultis la fuĝanton plenuŝe. Oni decidis denove ekiri por serĉi lin, sed ĉifoje oni ne revenu sen li.

Tre perfide, Sorkanŝira proponis, ke ĉiuj pelantoj denove iru al la sama direkto, kie jam estis, sed nun estu pli atentemaj ol antaŭe. Tiel estis. Oni disiris ĉiuj al siaj direktoj. Tiel Sorkanŝira denove venis al la bordo. Proksimiĝis al Temuĝin, kiun intertempe la riverfluo forportis duonkilometron laŭflue ka mallaŭte diris al li:

- Ne zorgu pri io ajn, nur gardu vin!

Sed al Temuĝin ne estis facile gardi sin. Li sentis, ke frostiĝas. Foje li sentis bezonon terni, sed ĉifoje li sukcesis reteni sin, ĉar tio povus perfidi lin.

Kiam denove ĉiuj pelantoj revenis sen rezulto, komencis konsultiĝo. Oni decidis la trian fojon iri al serĉado:

- Li ne povas ankoraŭ esti tro for kun tiu kolumo – rimarkis unu el la pelantoj.
- Eĉ seflugiloj elkreskus al li, tiu bubaĉo ne sukcesos fuĝi de ni - aldonis la alia.
- Mi la plej volonte rostus lin sur turnrostitilo, se mi kaptus lin - diris la tria, - tiom li turmentis nin!

Laŭ la sama ordo Sorkanŝira estos taskigita traserĉi riverbordon. Ankaŭ ĉifoje li proksimiĝis al Temuĝin kaj diris:

- Plej baldaŭ ni disiros al niaj domoj finonte la serĉadon. Tiam vi antaŭ aŭroro elriveriĝu, ekiru al via regiono kaj serĉu vian patrinon kaj la fratojn. Ili atendas vin. Se iu estus trovinta vin, neniel vi diru pri nia renkontiĝo. Tio povus ĵeti min en grandan malbonon.

Kiam Temuĝin restis sola, li ekpensis: „Kiam mi, kiel kaptito pasigis la nokton en jurto de Sorkanŝira, liaj du filoj kompatis pro mia sorto. Ili deprenis la kolumon kaj permesis al mi libere moviĝi. Nun, kiam Sorkanŝira trovis min, li ne perfidis min. Eble tiu familio povus defendi min, se mi sukcesus atingi ĝin. Ĉiokaze, tio estas la lasta solvo, restanta al mi.”

Pasero en arbusto

Temuĝin ne atendis aŭroron, sed decidis sian ideon plej rapide realigi.

Li eliris el akvo. La malvarma aero vipis lian malsekan korpon. Pro tio li ekkuregis Onon borde, al jurto de Sorkanŝira, soleca, iom malproksime de la jurtejo. Tute frostita, kun vestaĵo rigida pro glacio, kun kolŝarĝo li atingis la jurton. Sen frapado, laŭ tiea kutimo malfermis la pordon, enirante la jurton.

Ĉe lum' de fajrejo, en kiu viglas la fajro, la dommastro tuj rekonis lin. Sed anstataŭ bonveno, li eksaltis:

- Ĉu mi ne diris al vi, iri al familio? Vi nur malfeliĉon alportos al mi, se iu vidos vin ĉi tie. Kial vi alvenis?

Temuĝin staris humile kun rigardo malsupren. Li impresis kiel kompatinda estaĵo. La du filoj de Sorkanŝira defendis lin:

- Kiam la nizo pelas la paseron ĝi sin kaŝas en arbusto. Tiam la arbusto ne forpelas ĝin, sed adoptas ĝin protekte. Tio estas la leĝo de la naturo. Ĉu ni estu malpli bonaj ol la simpla arbusto? Kial vi riproĉas lin, pro la azilserĉo en nia jurto kaj vi mem bone scias pri via instruo: la jurto estas sankta, kiu troviĝus en ĝi, sendepende, ĉu amiko ĉu malamiko estas nia gasto, kaj tiel ni devas trakti lin.

Senatente pri patra grumblado, la junuloj rompis la kolumon kaj bruligis ĝin. Ili forigis de sur li la frostitan del-on kaj vestis lin per mantelo de unu el junuloj. Donis al li lokon apud fajro, ke li envolvita en varmaj kiletoj pasigu la reston de nokto.

Sed en aŭroro Sorkanŝira ellitiĝis kun timo, pro hazarda alveno de pelantoj en ilian jurton kaj kiuj trovis la rifuĝanton sub lia protekto. Tion li klarigis al siaj filoj kaj ĉiuj kune decidis Temuĝinon kaŝi en la ĉaro plena da lano, kiu situis malantaŭ la jurto.

Tiel ili faris. Temuĝin kuŝiĝis en ĉaron, kovrita per la tuta ŝarĝo da lano.

Tiel la junulo estis bone kaŝita, sed lia pozicio eĉ neniom estis agrabla. Komence li apenaŭ povis spiri. Tiam palpante li trovis du centimetran larĝecon inter du bretoj, ĉarfunde. Surventre li lokiĝis tiel, ke tra tiu aperturo li povis libere spiri. La ŝarĝo ne tro pezis al li, kaj la varmigado de lanvarmo en tiuj frumatenaj horoj tute ne ĝenis lin. Nur tagmeze li komencis ŝviti. Ekmemoris kiel li pasigis la lastan nokton en glaciigita rivero kaj konstatis, ke ĉiokaze nun estas malpli suferanta ol tiam.

Unu el junuloj tagmeze alportis al li manĝaĵon, kiun li povis formanĝi ne elirante el kaŝloko.

Tiun tagon li pasigis sen speciala okazaĵo, same ankaŭ la venontan, la restado en tiu sufoka, varmega kaŝejo, por Temuĝin estiĝis ĉiam pli neeltenebla. Ĝis kiam li devas tiel kuŝi, li demandis sin.

Nur la trian tagon - kiam la Tajĉiutoj ripozis de festado - kaj nokta serĉado de sia kaptito, ili denove rememoris, ke li ne povas ie tro foresti kun la kolumo kaj certe estas ie proksime.

Ili decidis daŭrigi la serĉadon. Ili elpensis, ke la grupo de pelantoj traserĉu ĉiujn jurtojn, eble la fuĝanto kaŝiĝis en unu el ili.

La traserĉado komencis. Tagmeze, la kvaropo atingis la jurton de Sorkanŝira.

- Ne koleru, Sorkanŝira-batur – diris unu junulo el grupo de serĉantoj titolinte lin laŭ estimo, kiu apartenas nur alt re kuraĝaj homoj – ni alvenis traserĉi vian jurton se eblas trovi tiun friponon.

Nur serĉu, laŭvole. Ĉiuj ni deziras trovi lin – rediris Sorkanŝira, ne tute sincere.

Ili renverŝis ĉiun kovrilon sur lito, malfermis ĉiun keston kaj levis la plankan drapon. Ili eĉ kaldronon enrigardis. Unu palpis eĉ la felsakon, pendigitan apud enirpordo por kontroli, ĉu vere en ĝi estas kumiso, aŭ la juna fuĝanto. Ĉio restis sen rezulto.

Tiam eliris jurton kaj komencis ĉirkaŭiradi ĝin. Enrigardis ŝafejon, inter la ĉevaloj kaj fine unu el ili komencis demeti la lanon de sur la ĉaro. Sorkanŝira, kiu iomete helpis al serĉantoj nun kvazaŭ ŝerce diris:

- Ne faru vin ridindaj, amikoj miaj, eble vi ne pensas, ke iu ajn povus elteni viva sub tioma ŝarĝo da lano!

La pelantoj mem estis ŝvitantaj en la tagmeza sufoko kaj pravigis la dommastron, ĉesis la serĉadon, adiaŭs la dommastron por foriri al iu alia jurto.

Temuĝin povis ĉion aŭdi tra spaco inter ligno tabuloj kaj ni povas imagi kiom li tremtis pro la propra vivo. Kiam li aŭdis la adiaŭ-vortojn, li ekspiris libere. Li sciis, ke ĉi-momente savis lin la hazardo, sed li ankoraŭ ne formoviĝis el sia neeltenebla pozicio.

Nur malfrupespere, kiam la domanoj konvinkiĝis pri nereveno de pelantoj, ili forpuŝis la lanon kaj eltiris Temuĝinon. Li estis pala kaj apenaŭ povis stari surpiede. Sorkanŝira diris al li:

- Ili preskaŭ pereigis min pro vi! Nur iru serĉi vian patrinon kaj la fratojn, ili certe jam zorgas pro vi.

La dommastro al juna fuĝanto donis viglan brunĉevalon kun selo. En sakon metis sufiĉe da kuirita viando kaj du ladbotelojn plenigis per kumiso. Donis al li pafarkon kaj du sagojn, kontraŭ eventuala atakado flanke de malamikoj, ke li povu defendi sin. Silikon li ne donis, li ne venu en tenton, bruligi fajron, ĉar la fumo perfidus lin.

- Iru kun fortuno kaj gardu vin la spiritoj de stepo - diris Sorkanŝira, dum Temuĝin grimpis al la selo

- Dankon al vi Sorkanŝira-batur, mi ne forgesos la bonecon vian kaj viajn kuraĝajn filojn. Adiaŭ! – diris Temuĝin mallaŭte.

- Gardu sin bone kaj estu rapida – aldonis unu el junuloj.

Temuĝin estis preta foriri, sed ankoraŭ staris senmove. Li sentis la fortan batadon de koro. Direktis sian rigardon al siaj samaĝuloj kaj rimarkis iliajn zorgemajn, amikajn rigardojn. Apenaŭ li sukcesis diri per emocia voĉo:

- Amikoj...fratoj miaj...neniam mi forgesos, kion vi faris por mi!

Tiam li spronis la ĉevalon kaj per sovaĝa galopo enŝovis sin stepen.

Tiel li rajdis dum tuta nokto. La steloj surĉielaj direktis lin kaj li scipovis inter konstelacioj rekoni tiujn, kiuj helpis lin en orientiĝo. Tio estas la fundamenta kono de ĉiuj rajdantoj en tiu vasta lando, kie ekzistas neniu alia ebleco por orientiĝo.

Estis frumateno, kiam li atingis la lokon en arbaro, kie li kun familianoj estis en reduto per sindefendo de malamikoj. Li ekmemoris, ke tie li lastfoje vidis sian familion.

Li elseliĝis kaj fikse trarigardis la lokon. Fine li trovis la spurojn, kiuj indikis la fuĝdirekton de sia familio.

Li enseliĝis kaj sekvis la spurojn. Ili gvidis lin al rivero Onon kaj laŭborde, riversupren li daŭre sekvis la spurojn.

Atinginte alflurivereton de Onon, laŭ ĝia bordo li plu sekvis la spurojn.

Fine li ekvidis la bone konatan tendon, tiel karan al li.

La ĝojo estis granda pro la revidiĝo. Precipe pro tio ĉar lia patrino estis konvinkita, ke ŝi neniam plu revidos lin.

Senvorte Temuĝin ĉirkaŭbrakis la patrinon, ĉiujn fratojn kaj fine plej longe la fratinnon, plej junan en familio.

- Jes, mi vivas kaj mi jen estas inter vi – ripetadis la veninto al ĉiu demando starigita al li. Ĉar li ne povis rakonti pri ĉiuj travivaĵoj kaj suferoj, kiujn travivis dum iom malpli ol monato ekde de kiam ili disiĝis.

Li eĉ ne sciis, kie komenci la rakonton, tiom li havis en si por diri.

La patrino rigardis la junulon ne povante satrigardi lin.

Dum tiu mallonga tempo li fariĝis plenkreskulo. Li ne plu estis knabo, kiel antaŭe, kvankam li estas apenaŭ nur dektrijara. Ĉio, kion li travivis dum lastaj tagoj, riĉigis lian vivsperton kaj konon de homa naturo. Sed li kolektis en si ankaŭ multan ĉagrenon, dezirante esti potenca, ke li povu kontraŭstari atakemon de malamikoj.

Dum la sekvontaj tagoj estis gaje en familio. Ĉiuj ĝojis pro si reciproke. Sed en tiu gajeco al ĉiuj estis klare, ke iliaj malfacilaĵoj ne finiĝis. Ke iliaj malamikoj ne lasos ilin en paco. Ili aperos denove, tuj, vidante, ke la familio bonstatas.

- ni daŭrigos –

Helpe alvenis

Karaj niaj legantoj!

Mi informas vin, ke por solvi la vidkapablo-problemojn, nia revuo ricevis novan helpantan kunlaboranton. Li estas sinjoro Jozefo Horvath el la hungara urbo Győr. Li tradukos iun parton de niaj tekstoj, ĝis iamaniera solvo de la vidproblemoj de la redaktantoj gesinjoroj Adrienne kaj László Pásztor. Mi dankas por la alveninta helpo de nia bonkora samideano.

Bonvolu konatiĝi kun nia altestimata samideano, laŭ lia biografio:

[http://eo.wikipedia.org/wiki/Jozefo_HORV%C3%81TH_\(Gy%C5%91r\)](http://eo.wikipedia.org/wiki/Jozefo_HORV%C3%81TH_(Gy%C5%91r))

s-ino Adri Pásztor

ANONCOJ

Retpaĝo de HEA

Karaj niaj legantoj!

Bonvolu registri vin al retpaĝo de Hungarlanda Esperanto-Asocio <http://eszperanto.info>

HUNGARIO, legu pri hungariaj urboj - <http://hungario.hu>

ESENCOJ, la informkolekta portalo de HEA - <http://esencoj.info>

Esperanto 2.0 TV - http://worldtv.com/esperanto_2.0_tv

Se via registro ne sukcesis, turnu vin por helpo, al Ferenc Harnyos hferenc@pr.hu

S-ro Ferenc Harnyos

ILEI en Krakovo

From: Aida Cizikaite

ILEI konferenco - ambau: amuzo kaj scienco!

Se Vi ŝatas ligi aktivan esperantumadon kun esplorado de diversajn mondopartoj, plej bona elekto por Vi estas

ILEI-konferenco en Karakovo (Pollando) la 17-25an de julio, 2009 - tuj antaŭ UK!

Ni proponas ne nur

- Sciencan Simpozion laŭ konferenca temo
- diversajn seminariojn
- variajn prelegojn
- fakajn diskutojn kaj laborgrupojn

Ni proponas ankaŭ riĉan kulturalan kaj distran programon

- Interkonan (manĝ)vesperon
- Nacian Vesperon
- Internacian Artan Vesperon
- Lingvan Festivalon
- ĉiutagan artan vesperan programon
- ĉiutagan distran vesperan programon

KAJ

tre interesan kaj valoran ekskursan programon por konatiĝi kun

- kongresurbo
- kongresregiono
- kongreslando

Por scii pli, kion Vi nepre devas vidi en Pollando, en regiono Malopolska, en kaj apud Krakovo, bonvolu viziti retpaĝon de ILEI www.ilei.info (tie Vi trovos multajn informojn ne nur pri la konferenco) aŭ iri rekte al <http://www.ilei.info/konferenco/alvoko1Krakovo.jpg>
/Al la esp-en-hung korespondlisto sendis Ilona Koutny d-rino/

Konservado de historiaj tradicioj en Hungario

En niaj naciaj festoj estis ĉiam kutimo, iel prezenti okazaĵojn de pasintaj tempoj. Mi memoras, mi estis sepjara, kiam la 15an de Marto 1948, memore pri nia venkita liberecbatalo kontraŭ la Habsburgoj de 1848 ĝis 1849 trapasis en Miskolc husaroj, vestitaj laŭ modo unu jarcenton pli frua kun niaj flagoj kaj armiloj el 1848. La brile strigitaj ĉevaloj dancadis sub la rajdistoj, la sabroj, bajonetoj brilis, glimis. Por la konservo de la nacia konscio ja necesas ankaŭ la revivigo de la patrujamo kaj historiaj eventoj.

Poste la naciaj memorfestoj konsistis ne nur el tio. La nombro da spektakloj, organizitaj por la loĝantaro plimultiĝis, ilia nivelo pliboniĝis.

Nuntempe jam estas kreita fondaĵo, kiu okupiĝas pri la organizado de tiaj spektakloj. Ĝia centro troviĝas en Budapeŝto. Pro tio, ke la kastelo en Diósgyőr estis en la hungara mezepoko la fortikaĵo de la reĝinoj, oni organizas en la festotagoj de nia konstitucio, la 19-20an de

Aŭgusto de ĉiu jaro kaj ĉirkaŭ ĉi tiuj datoj la t.n. „mezepokan tumulton” ĉirkaŭ la kastelo. Ties ĉefrolantoj estas elstara aktoraro, disponigita de la fondaĵo. Ĝi organizas niajn tradidikonservajn programojn, kaj ĝi kunlaboras ĉie, kien oni ĝin invitas. Bonvolu konatiĝu kun ĝi.

s-ino Adri Pásztor

„FONDAĴO MARE TEMPORIS

Pri nia fondaĵo

Nia amika rondo organiziĝis aŭtune de 2000 en societon por konservado de historiaj tradicioj. La fondintoj estas entuziasmaj junuloj, kiuj jam elprovis sin en la bunta, alloga mondo de ludoj, reaperigantaj la mezepokon. Vidante kaj spertante, kiel viktimiĝas la historia aŭtentikeco pro negocaj interesoj en kelkaj aranĝaĵoj kaj konsiderinte la plendojn kaj rimarkigojn de niaj konatoj muzeologoj ni venis al la konkludo, ke ni ŝatus aliri la aferon el radike alia direkto – kaj teknike, kaj spirite.

Ni starigis al ni la celon, studi kaj flegi la kulture heredaĵon de la 14a ĝis 17a jarcentoj, kaj kontribui al ties diskonigo parte per instrua laboro, parte per organizado de programoj, prezentadoj, ludaranĝoj.

Nian fondaĵon registris la Ĉefurba Tribunalo la 18an de Januaro 2002, kaj deklaris ĝin komunitala organizaĵo. La tempon post la organigziĝo kaj fondo karakterizis konstanta spirita kaj materiala evoluo. Dum la paso de la jaroj pluraj novaj membroj aliĝis al ni, kaj la komenca societo elmanpleno da membroj kreskis nuntempe je 80-kapa organizaĵo.

La membroj de nia fondaĵo estas precipe junuloj inter 16 kaj 35 jaroj, kiuj apud siaj mezlernejaj, universitataj studoj aŭ laboroj konsiderindan parton de sia libertempo dediĉas por la komuna laboro. Ĉi tie komuna laboro signifas ne nur senĉesan lernadon, ekzercojn por la prezentadoj, faradon de vestaĵoj kaj uzobjektoj, armiloj, sed ankaŭ konstantan esplorkoncepton kaj de la siatempaj kutimoj, kaj de la historiaj fono kaj okazintaĵoj.

La bazon de nia interessfero konsistigas la multkolora kaj vivĝoja renesanco, sed ni okupiĝas ankaŭ pri la tumulto, mistera, kelkfoje al dekadenco inklina mondo de la malfrua mezepoko kaj la kolorpompa, tonriĉa, pasia epoko de la frua baroko.

Niaj ekipaĵoj, vestaĵoj kaj armiloj, sed ankaŭ niaj kulisoj adaptiĝas al la elektita epoko. Surbaze de siatempaj bildoj, pentraĵoj kaj priskriboj, kulturhistoriaj, modhistoriaj studoj, rekomendoj de faksperimentoj ni konsistigas niajn kostumojn, vestojn kaj ankaŭ la uzobjektojn, armilojn, kaj per nia konduto ni same klopodas videbligi la kutimojn, mondkoncepton kaj etiketon de la epoko.

Ni konsideras grave, flegi bonajn kontaktojn kun hungaraj kaj eksterlandaj teamoj, fakuloj, okupiĝantaj pri konservado de historiaj tradicioj, malnov-muzikaj ensembloj, kaj fortigi per komuna laboro kun ili la aferon de la konservado de tradicioj.

Nia celo estas, enigi la publikon de la nuntempo ankaŭ ekster niaj prezentadoj kaj okupiĝoj en la de ni tiom amatan mondon, kvazaŭ proksimigante tuŝdistanco la antaŭlonge pasintajn epokojn, por fari la al ni heredigitajn „kaŝitajn trezorojn” laŭvorte komuna trezoro, perante tiamaniere tian spiritecon, valorordon, kiuj restas ankaŭ en nia ŝanĝiĝanta, moderna epoko eternaj valoroj.

FONDAĴO MARE TEMPORIS

Niaj metioj

Ni scias, ke ne eblas esplori la okazintaĵojn de la historia pasinteco kaj la personojn partoprenintaj en ili izole, el malvastigita vidpunkto, tial ni klopodas aliri el laŭeble plej multaj flankoj la de ni ŝatatan epokon. Por tio ni konsideras necese, plifortigi la kooperadon inter la branĉoj de la konservado de tradicioj, evoluigi niajn konojn kaj kapablojn en laŭeble plej multajn direktojn.

Ofte okazas, ke niaj membroj partoprenas en la laboro de nu nur unu, sed pluraj teamoj. Tio donas okazon por elprovi nin en pluraj kampoj, cizeli niajn konojn, samtempe disvolvi kaj plifirmigi la amikajn interligojn, prosperantajn ene de nia Fondaĵo. Ni kredas, ke la amikeco kaj entuziasmo, kiuj dekomence funkciis kiel motoro de nia komuna entrepreno, kuniĝante kun engaĝita intereso pri la historio kaj diligenta ekzercado fariĝos la ŝlosilo de nia senĉesa evoluo.

Niaj agadoj grupiĝas ĉirkaŭ kvar metioj:

- ❖ Niaj dancistoj okupiĝas ĉefe per ellerno de renesancaj kaj frubarokaj dancoj, aranĝado de pompaj dancospektakloj – sekvante originalajn dancopriskribojn, vestofiguradojn kaj kortegan etiketon, aŭ kadre de kundancadoj ili klopodas konigi la etoson de malnovaj epokoj al la interesiĝantoj.
Niaj ventrodancistoj reaperigas la misteran mondon de haremoj per la studado de la danc- kaj kondukulturoj, baziĝantaj sur turkaj tradicioj el la 15a-16a jarcentoj
- ❖ Niaj skermistoj alproprigas en regule aranĝitaj trejnadoj la mezepokan kaj historian dueladon, krom studi la tiutempajn armilojn kaj kutimmojn, skermoteknikojn. Pere de siaj skermaj prezentadoj ili volonte montras al la publiko la malmulte konatan, eŭrop-devenan, tradician batalarton.
- ❖ Niaj aktoroj klopodas per la surscenigo de mezepokaj kaj renesancaj teatraĵoj, de tiutempe okazantaj niaepokaj dramoj, aranĝo de dancaj literaturaj vesperoj, prezentado de versaj komedioj epokfidele revivigi la pasintecon antaŭ la publiko de la nuntempo, amuzi kaj samtempe ankaŭ instrui.
- ❖ Niaj spektaklistoj amuzas la spektantojn dum la paŭzoj de prezentadoj aŭ en memstaraj spektakloj, revivigante la plurjarcentajn tradiciojn per plej diversaj instrumentoj de la malnovaj epokoj kaj de la nuno. Post sunsubiro niajn renesanc-koregajn spektaklistojn interŝanĝas niaj fajrojnglistoj, niaj anĝeldancistoj – unikaj en sia speco en Hungario – estas ŝatataj rolantoj en diversaj defiladoj, liberaeraj aranĝaĵoj.

Multfaceteco kaj vasta gamo karakterizas niajn programojn, en kiuj la teamoj memstare, sed ankaŭ en harmonia kunlaboro povas pruvi siajn kapablojn. Krom prezentado de dancoj, armiloj, teatraĵoj kaj spektakloj ni konsideras grave, aliri ankaŭ la infanojn, por ili ni organizas neordinarajn lecionojn de historio, metiajn kaj logikludajn okupiĝojn, skermo- kaj arkpafajn lernadojn aŭ kundancadojn.

2008 estis la Jaro de la Renesanco

La jaro 2008, 550a datreveno de la surtroniĝo de reĝo Matiaso estis la Jaro de la Renesanco, en kiu diversaj muzeoj, kasteloj kaj ceteraj lokoj atendis kun multnombraj ekspozicioj, interesaj programoj la interesiĝantojn pri la renesanca epoko.

Nia fondaĵo dediĉis la jaron 2008an same al la epoko de reĝo Matiaso: ni konsistigis novajn programojn, kiuj koncentriĝis anstataŭ simplaj prezentadoj sur interpretadajn ludojn. Krome

ni evoluigis niajn ekipaĵojn, vestaron, kaj per diligenta faka laboro ni plivastigis ankaŭ niajn konojn.

Unu tago en la kortego de reĝo Matiaso

Ni faris viziton en la kortego de reĝo Matiaso, en kiu krom esti en epokfidelaj kostumoj ni reaperigis per diversaj prezentadoj unu tagon de Matiaso kaj Beatrice kune kun ilia kortega medio. En la kadroskenoj ni prilaboris anekdotojn, legendojn el la epoko de Matiaso. La spektantoj povis plezuriĝi per la prezentadoj de niaj spektaklistoj, kune kun la partoprenantoj de la turniroj ili entuziasmis por la venko, la damoj kaj sinjoroj de la kortego prezentis buntan gamon da siatempaj renesancaj dancoj.

Dum la programoj nia Heroldo transprenis la direktadon, kaj atentigis la publikon pri la spektakloj, interesaĵoj. La spektantoj povis admiri tuŝproksime la kostumojn kaj armilojn, povis sperti, kia estis la vivo en la epoko de Matiaso por la korteganoj, kaj eĉ mem povis partopreni la okazaĵojn. La rolantoj intermiksiĝis kun la amaso, plenumis diversajn taskojn, prezentis scenojn, konvenajn al ilia rolo, iris-venis inter la vizitantoj, iniciatis babilojn kun ili, por kavazaŭ tuŝe proksimigi al ili la renesancan vivon.

La tendaro de la Nigra Armeo

La Nigra Armeo estis la konstanta kerno de la soldula armeo de reĝo Matiaso, kiu validis unika en sia speco en la tiama Eŭropo. Ĝi estis eksterordinare bone organizita armeo kun modernaj strategiaj principoj, ĝi bone taŭgis por la centriga politiko kaj konkeraj celoj de reĝo Matiaso. Ĝia konstanta nombro estis 8-10 miloj, sed dum militiroj ĝi duobliĝis. Ĝia ĉefaj trupospecoj estis la atakkapabla infanterio, la artilerio, la pezkirasita rajdistaro kaj la malpeza kavalerio.

Niaj programoj ebligis al la spektantoj, krom la kavaliraj prezentadoj enrigardi en la ĉiutagojn de milita tendaro. Vizitante la tendaron la interesiĝantoj – infanoj kaj ankaŭ plenkreskuloj – povis mem elprovi la uzon de la armiloj de la kavalira epoko, povis senti la pezon de la kirasoj, testi sian lertecon per arkapafado aŭ ĵetarmiloj. Por la junaj paĝioj la militharditaj soldatoj gvidis apartan trejnadon.

La spektantoj ricevis impresojn el la ĉiutagoj de la kavaliroj, pretigantajn sin por batalo. Ili povis okulsekvi la senĉese konkurantajn kavalirojn dum kubludado, disputoj aŭ armilpurigado. Kaj se ili trovis maljunajn, militharditajn soldatojn en bona humoro, ili povis aŭdi rakontojn pri pasintaj bataloj.

Fondaĵo Mare Temporis maretemporis@freemail.hu

Dóra Wenczel

(Esperantigis: Jozefo Horvath – Győr)





NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Tel.: +36 46 738 982

Retpošto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>